

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FRANKOJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONO

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

F E N T V I A

La Direcció General de Comunicacions d'Espanya ha declarat admetre l'Esperanto com a *llengua clara*, seguint l'exemple de França i els altres Estats membres de la Lliga de Nacions. Felicitem els nostres companys de la «Hispana Esperanto-Asocio» per gestions dels quals ha estat reconegut l'Esperanto oficialment en el dit Departament de l'Estat Espanyol.

Homens de Ciència dels països més avançats s'han reunit darrerament a Paris sota la presidència del nostre eminent amic Charles Richet i el Rector de la Sorbonne, i han convingut en la necessitat d'emprar l'Esperanto per a la Ciència.

En Conferència internacional de Fires de Mostres i altres entitats comercials, sota la presidència del Secretari de la Chambre de Commerce de Paris i sota els auspicis de son patronatge, autoritats prestigioses del món comercial, han convingut en la necessitat d'adoptar l'Esperanto per al Comerç.

Els Jocs Florals Internacionals d'èxit insospitat presenten l'ús recíbit de l'Esperanto per a la Literatura.

A la Universitat Imperial de Tokió, on fins ara la medicina era ensenyada emprant els mots tècnics en alemany, els professors han començat a substituir l'alemany per l'Esperanto.

Els cursos universitaris internacionals que seran donats en Esperanto a Ginebra l'agost vinent, sobre psicologia, pedagogia, lingüística i electrotècnia, presenten una prova més de l'ús definitiu integral de l'Esperanto com a llengua auxiliar internacional.

Invitem els nostres homes intel·lectuals a conèixer o reconèixer la veritat sobre l'esperanto. I ens plau de poder-ne citar de tan prestigiosos com Joan Arús, Rovira i Virgili, Carles Riba, Millàs Raurell, Jordana, entre els que sabem més matiners en aquesta qüestió. Els Drs. Torres Carreras, Figuerola, Bremon, Orriols, Bartomeu, Teresa Campaña, Jacint Barrera, Marian Solà, Gustau Galceran, figuren en les llistes dels esperantistes militants de la Federació Catalana d'Esperantistes.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comercè)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

Mi skribas
Jo escrib

IS

temps passat

skribis
escrivi

OS

temps futur

skribos
escriurè

US

mode condicional

skribus
escriuria

U

mode imperatiu o subjunctiu

skribu
escrigul

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escrib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

Raporto pri la XII^a Kongreso de K. E. F.

21-25 Majo 1925 — Palma de Mallorca

Alveno de la kongresanoj

La bela vaporŝipo «Mallorca», plena de gesamideanoj enŝipiĝintaj antaŭ 10 horoj en Barcelona, je la 6^a matene de la 22^a de Majo, alvenis la belan havenon de Ciutat de Mallorca, atendata de balearaj samideanoj sub la prezido de reprezentanto de la urbestro, Sro. Fiol, kaj de nia pioniro Narciso Bofill. La alvenantaj kaj la atendantaj gesamideanoj kun esperantistaj flagoj intersalutis sin kun ĝojo kaj amikeco. Kaj en aŭtomobiloj kaj aliaj veturiloj ĉiuj iris al respektivaj hoteloj kaj loĝejoj.

Akceptejo ĉe la Esp. Klubo

Je la 8^a ĝis la 9^a renkontiĝis ĉiuj kongresanoj en la oportuna sidejo de la Palma Esp. Klubo, kaj tie ĉiu ricevis belajn Gvidlibron kaj kongresinsignon kaj vizitis gravan Ekspozicion de esperantaĵoj.

Vizito al la Aŭtoritatuloj

Je la 9^a, promene tra la bela urbo, la gekongresanoj iris viziti la Urbodomon kie nin atendis la urbkonsilanto Sro. Fiol reprezente de la urbestro. Bonvenaj kaj dankaj intersalutaj paroloj interŝanĝiĝis, kaj gvide de la aŭbla urbkonsilanto ni vizitis la riĉan kaj belan Urbodomon de Palma.

Poste ni iris al la Deputitejo, kie okazis simile, ankaŭ la guberniestron kaj fine la militestron. Ĉe la antaŭlasta nia impresio estis eksterordinara

ĉar tie la vizitato Sro. Pérez, post longa atendigo alvenis kaj diris al ni ke oficiale li malkonsentas pri nia Movado, ĉar estas devo nia propagandi kaj disvastigi la hispanan lingvon, kaj tiu «dialecto mundial»—li diris rilate al Esperanto—ne devas konkuri ĝin. Tiu neatendita respondo al nia saluto kaj vizito obee al konsilo de nia amiko Bofill, vere strange impresis nin, sed pense al la politikaj cirkonstancoj kaj sendanĝerige al nia Kongreso ni ĉiuj mutemis pri tiu temo.

Solena Meso kun Esp. prediko

Multnombra publiko esperantista kaj neesperantista ĉeestis la katolikan diservon. Efektive la esperanta prediko anoncita estis altira. La preĝejo estis ornamita kiel okaze de plej solenaj festoj religiaj. Ĉi-tie komencis mirigi nin la malvarmo de la organizinto de la Kongreso.

Pastro Bartomeu Font, malnova Mallorca samideano, faris elokventan predikon plurfoje eĉ kun impresaj silentoj. «La Espero», nia tuta himno, estis ankaŭ en la prediko. Ĉiuj ĉeestintoj certe longe memoros la predikon de Pastro Bartomeu.

Malferma Kunsido

En la salono de la «Asociació per la Cultura de Mallorca», kun ĉeesto de multaj kongresanoj, la Direkta Komitato de K. E. F., la Organiza Komitato de la Kongreso, S-ro Kreuz reprezentanto de la Centra Komitato kaj de U. E. A., S-ro F. Fiol delegito de la Urbestro, je la deka matene okazas la Solena Malferma Kunsido.

Unue la delegito de la Urbestro kore salutas la kongresanojn kaj deziras al ili plaĉan restadon en la insulo Mallorca. S-ro Bofill, Prezidanto de la Organiza Komitato, legas paroladon tiun-ĉi:

«Altestimataj gesamideanoj:

Estu bonalvenintaj, karaj pioniroj de nia movado, fervoraj kunbatalantoj de nia sankta afero, kaj akceptu, mi petas, plej koran kaj sinceran saluton kiun mi proponas al vi nome de viaj Palmaj samcelanoj dezirantaj kunfratiĝi kun vi okaze de nia Kongreso kaj samtempe pruvi al vi sian fratan samideanecon kaj puran amikecon. Mi esprimas al vi la respektajn kaj amajn sentojn de miaj samurbanoj esperantistaj kaj kvankam mi bone scias, ke mi ne estas tute lerta por bele paroladi kaj facile konvinki vin pri tio, ke ni, viaj kamaradoj el la bela insulo Mallorca, ĝojas kaj estas kontentegaj pro la okazigo de nia esperanta festaro ĉe ni, mi plenumante mian devon, kiel Prezidanto de la Organiza Komitato de nia Kongreso, honoras min saluti ĉiujn vin, distingindaj pretermaraj disciploj de nia senmorta kaj neforgesebla Majstro.

Estu certaj, karaj samlingvanoj, ke ni el tuta nia koro akceptas vin kaj

deziregas, ke via restado en nia insulo kaj en nia Palma estu por vi tre agrabla; por atingi tion ni faros ĉion eblan por plenumi viajn dezirojn kaj estas pretaj servi vin per frata zorgo same kiel se vi estus en via hejmo. Ni estas tute viaj kaj estus tre granda plezuro por ni se vi senkomplimente petus de ni tion, kion vi deziras aŭ bezonas dum vi estos niaj gastoj, kiun okazon ni tre honore kaj fiere uzas por esprimi al vi nian puran samideanecon.

Antaŭ ĉio, mi devas elmontri al vi mianome kaj nome de miaj ĉi-tieaj gesamideanoj, nian plej sinceran kaj koran dankemon por via ĉeesto al nia Kongreso; tial mi dankegas vin ke vi estas atentintaj nian vokadon, kaj ĉar el diversaj naciaj kaj fremdaj urboj venis tien-ĉi, en nian karan Mallorca, por plenumi nian deziron, por plezurigi nin, ĉar vi estas farintaj tion akceptante nian peton, atentante nian alvokon, kiun por sukcesigi nian Kongresan solenaĵon ni sciigis al vi per nia presorgano «Kataluna Esperantisto» kaj aliaj esperantistaj gazetoj. Akceptu, do, ankoraŭ unu fojon, mi petas de via ĝentileco, nian respektplenan kaj fratan dankon por tio.

Vere estas por ni, viaj komaradoj el la insularo, la unua fojo, kiam ni ĝuas la intiman haj kunfratiĝan festaron, kiun havigas Kongreso de Esperanto, precipe, kiel okazas je la nia, se en ĝi oni povas ŝati la literaturan feston nomitan «Floraj Ludoj», kiun amuzajon pli bone oni povus nomi universala ol internacia, kiel ĝi estas de ni nomata; festo la plej solena el ĉiuj, kiuj okazas en la tuta mondo esperantista kaj kiun neniu el la diversaj hispanaj Federacioj ankoraŭ povis okazigi en siaj regionoj; ni povas certigi, ke niaj Floraj Ludoj, kiel ni bone scias, estas belega festo, gloro de nia «Kataluna Esperantista Federacio», solena kaj brila literatura okazaĵo tre grava, kaj miregaĵo de samlandanoj kaj fremduloj. Ni devas daŭrigi, per nia peno kaj per la helpo de niaj estimataj kaj kleraj verkistoj, la famon de ĝia historio, ni devas atingi, ĉiun jaron, ke ĝi estu pli grandioza, ni devas klopodi por ke la listo de la premioj aljuĝotaj al la plej bonaj literaturistoj partoprenontaj ĝin estu multenombra por tiel povi premii multajn literaturamantojn. Mi konfidas al via fervora samideaneco kaj al via amo por nia kara Esperanto, ke vi igos ĉion, kion vi povos por nia tuta sukcesego. Fide mi esperas, ke ĉiuj vi ĉeestos nian literaturan feston por pli solenigi ĝin kaj ke neniu el vi mankos por varme aplaŭdi nian ĉarmaĵ Reginon, por rigardadi ŝian belecon kaj por kore gratuli la aŭtorojn de la premiitaj verkoj de la aludita konkurso. Faru tion, estimindaj pioniroj de nia movado, por la progresado de nia idealo.

Antaŭ kelkaj jaroj jam iu Palma samideano pritraktis la eblecon okazigi ĉe tiu-ĉi urbo Kongreson de «Kataluna Esperantista Federacio»; por sukcesigi tion li parolis pri tiu deziro kun diversaj eminentaj esperantistoj katalunaj okaze de ĉeesto en la lastaj Kongresoj de nia Federacio en malsamaj urboj en Katalunujo, sed lia projekto ne efektiviĝis pro iaj malfacilaĵoj kaj ĉar ne estis akceptita tia propono de la tuta ĉi-tiea samideanaro aŭ almenaŭ de la plimulto el ili; sed lastatempe dank' al la fervora sindoneco de

iaj malmultaj pioniroj membroj de nia loka Grupo «Esperantista Klubo Palma», tiu bela ideo okazigi la nomitan Kongreson en nia kara Palma, ĉefurbo de la baleara insularo, efektiviĝis pro la entuziasma helpo kaj pro la ĉiuspeca subtenado de la membroj el kiuj konsistas la Organiza Komitato, kiun mi tre honore prezidas. Ni ĉiuj aranĝis nian Kongreson, ni ĉiuj klopodis por ĝia plej brila okazigo kaj ni penis ankaŭ por ke nia festaro estu plej grandioza kiel eble, kune kun la famega literatura solenaĵo nomita «Floraj Ludoj», por kiu ni atingis tre gravan liston da premioj. Ni faris ĉion eblan, kaj eĉ neeblaĵojn, por sukcesigi nian entreprenon; ni ne igis pli, ĉar ni ne plu povis kaj se ĉio tio meritus vian aprobon, kaj viaj deziro kaj espero pri nia Kongreso kaj ĝiaj amuzaj estus plenumataj, ni estos tre ĝojaj kaj kontentaj, ke nia organiza laboro kaj peza tasko havigos al vi agrablan kaj ĝuigan restadon ĉe nia insulo, dum kelkaj tagoj. Mi tre esperas, ke ĉiuj vi pasigos gajajn kaj feliĉajn tagojn en nia Mallorca kaj vere mi bedaŭras ke nia amika kunestado daŭros malmulte da tempo, nur la necesajn horojn por okazigi nian kongresan festaron.

Malgraŭ tio, mi konfide kredas, ke multaj el vi volos ekskursi tra nia bela insulo dum kelkaj tagoj por rigardadi kaj elkoni ĝiajn naturajn belegaĵojn. Precipe oni povas igi diversajn ekskursojn tre interesajn; vi ne devas foriri al via hejmo antaŭ ol efektiviĝi ilin. Mi petegas de vi, ke atentu mian rimarkon pri tio, ĉar mi estas certa ke vi poste dankos min pro mia konsilo daŭrigi vian restadon en tiu-ĉi insulo por tia celo. Plenumu do mian deziron kaj plezurigante min vi havigos al mi kaj al la ĉi-tieaj gesamideanoj okazon povi vigligi nian puran amikecon, kaj nia kunfratiĝo plidaŭros, kiel ni el tuta nia koro deziras.

Al la kunestantaj personoj ankaŭ mi devas altiri ilian atenton pri tio, ke en nia urbo staras antikvaj konstruaĵoj, privataj kaj publikaj, kiuj meritus esti vizitataj de vi, se efektive vi ŝatas la belartojn. Nia Katedralo, nia Vendistarejo, diversaj nobelsinjoraj palacoj kaj preĝejoj, kelkaj modernaj kaj aliaj multmeritaj konstruaĵoj en Palma kaj ĉe ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas vizitindaj.

Mi ne volas fini mian paroladeton ne dirante al vi, ke kiam vi revenos ĉe vin, bonvolu diri al viaj konatuloj kaj amikoj, ke insulo Mallorca frate akceptis vin, ke la Palmaĵo samideanoj organizis Kongreson pli aŭ malpli bona kaj solena, ke la Floraj Ludoj kaj ceteraj festaĵoj estis pli aŭ malpli brilaj kaj grandiozaj, sed ne forgesu diri al ĉiuj kun kiuj vi parolos pri la XII^a Kongreso de nia kara «Kataluna Esperantista Federacio», kies unuan agon ni estas nun komencantaj, ke la samideanoj el Palma de Mallorca scias plenumi sian devon, ke ili deceprenis sur sin la kongresan taskon por atingi plenan sukceson je sia entrepreno kaj fine diru ĉie, mi petegas, ke ili estas fervoraj pioniroj de nia movado, ĉar ili pruvis sian puran esperantismon. Kaj se vi estas konvinkitaj pri tio, venigu niajn kamaradojn el la tuta mondo ĉeesti estontan kongreson, kiun sendube ĉu la Palmaĵo samideanoj ĉu tiuj el alia urbo de la baleara insularo okazigos post iaj jaroj por denove,

kiel ni igas nun, rekunfratigi kaj plie ĉiuj ni kune kun novaj varbitoj al nia paca kaj progresema movado disvastigi nian karegan Esperanton kaj praktike diskonigi nian Federacion en nia propra teritorio. Ni, do, devas diri, kiel diversajn fojojn jam diris: antaŭen, ĉiam antaŭen».

Korega aplaŭdado salutas je la fino de la parolado de S-ro Bofill.

Nia Prezidanto legas tuj poste la jenan paroladon:

«Estimataj kunfederacianoj:—La novaj ekonomiaj bazoj de nia Federacio pli intime kunvivigas ĉiujn esperantistojn katalunlingvajn, kaj tial plifortigis nian organizadon, kaj iom ĝin ekonomie plibonigis, sed nia ekonomia bazo ne estas ankoraŭ kontentiga. Ni atingis pli da enspezoj sed ni havas pli da elspezoj, kaj fine de la jaro ni ankoraŭ en 1925 havos deficiton. La malfacilo enspezi de multaj izolaj membroj kaj abonantoj, kiun ni povas nomi la nesufiĉa atentemo aŭ bonvolo de kelkaj samideanoj; la manko ĝis nun de pluraj riĉuloj fervoraj kaj riĉaj fervoruloj en niaj vicoj, kaj la ĝeneralaj krizaj cirkonstancoj nunaj, devigas nin al pli da sindonemo, kaj pli da klopodo varbi novajn abonantojn al nia gazeto.

Ni pruvis nunjare per aperigo regula de nia gazeto kiu meritas ĉies laŭdon en Esperantujo, ke ni estis agemaj, kuraĝaj kaj malavaraj. Vi subtenu nin responde al nia pruvo kaj nia afero daŭros okupi indan lokon en nia mondo. Ni devas pagi al la Konstanta Reprezentantaro. Ni devas organizi la Florajn Ludojn, respondi al grupaj demandoj, okazigi la ĉiujaran Kongreson. Nia tasko estas multa kaj grava. Ne manku al ni persona helpo de ĉiuj kiuj povas, nek subtena mono de tiuj kiuj havas; ebligu kaj larĝigu nian vojon kaj ni ankoraŭ multe pli faros: Eldono de lernolibroj kaj propagandiloj kaj vortaroj estas nun necesa. Jen estas nur unu urĝa afero kiu postulas monon. Estas multaj aliaj. Mono, klopodo estas ja bagateloj kompare la ĝojon de sukceso kaj plenumo de devo. Estu malavaraj. Eĉ cele de plej bona profito de plej intima gajno: sateco de bonago. Bonagu, bonfaru por nia K. E. F. kiu devas plenumi gravan taskon en la vojo al nia sankta celo, kaj fina venko».

Longa aplaŭdo montras la unuaniman konsenton de la kunvenintoj al la ideoj tiel trafe esprimitaj de nia Prezidanto.

La sekretario petas poste al la delegitoj de la diversaj grupoj aliĝintaj al nia Federacio doni siajn nomojn kaj saluti la Kongreson: tiel faras S-roj Joan Comadran en la nomo de «Aplech» el Sabadell; S-ro Joan Prat el «Bella Espero» el Manresa; S-ro César Gallego el «Paco kaj Amo» el Barcelono; S-ro Jaume Grau el «Barcelona Stelo» el Barcelono; S-ro Amadeu Ribas el «Nova Sento» el Barcelono; Ptro. Josep Planas, el «Esperanta Nesto» el Ripollet kaj S-ro Marian Solà el «Lumon» el Terrassa. Ankaŭ salutas la kongresanojn S-ro Robert Kreuz, delegito de la Centra Komitato. Oni decidas laŭ propono de S-ro Jaume Grau sendi telegramon al S-ro Joan Barceló en Maroko kiu pro siaj okupoj ne povas esti kun ni dum la tagoj de nia Kongreso.

Aligis al la Kongreso per telegramoj kaj leteroj la S-roj kaj Grupoj: S-ro Valentí Bruch el Selva del Camp. Johano Flaquer el Capdepera; Miquel Mollé Capdepera; F-ino Louise Briggs el Armléy; «Hela Lumo» el Ateneu Cultural Obrer el Vich: Henriko Ruedl el Bozen; D-ro Jascinte Bremon el Barcelono; «Nova Patro» el Mataró; P-tro Ribas, Mulist, Farres, Noguera, Benet Pomades, Geedzoj Comella el Vich; Josep Grau Casas el Barcelono; «Esperanta Idealo» el Santa Coloma de Farnés; S-ro Maynar el Zaragoza; «Suno Hispana», «Federación Levantina», «Valencia Grupo» el Valencia; Joan Barceló el Ceuta; Grupo Lumradio» el Cheste; «Juneco» el Girona; «Ĝèrona Espero» el Girona; F-ino Palmira Castellví el Barcelono; S-ino Dolors Magre el Santa Coloma de Farnés; Valentí Alavedra el Terrassa; Rodolfo Horner el Ĝenevo; Pere Domènech el Vilassar de Mar; «Frateco» el Vendrell, Engelman el Rosny sous Bois, D-ro Privat, k. a.

La Prezidanto rekomendas al ĉiuj akuratan viziton al la laborkunsido vespere okazonta, kaj fermas la Malferman Kunsidon.

Esp. Ekspozicio kaj Ekzamenoj.

Posttagmeze, dum multaj gesamideanoj vizitis la Esperantajaron en la Klubo Palma, ĉe la «Associació per la Cultura de Mallorca» okazis ekzamenoj, ĉe kiuj rimarkigis nia estimata plurfoje premiita germanlingva samideano el Ĉekoslovakujo, S-ro Josep Berger, kiu kandidatis por la Diplomo pri Profesoreco de Esperanto, kaj ĝin atingis kun laŭdoj.

Laboraj Kunsidoj

En la salono de «Associació per la Cultura de Mallorca» je la sesa vespere la Prezidanto malfermas la kunsidon.

Unue parolas S-ro Berger el Córdoba pri la nova projekto de Hispana Esperantista Federacio kaj raportas pri la taskoj efektivigitaj en la Cordoba Kongreso. S-ro Dalmau respondas al li kaj montras sian konsenton al tiuj ideoj. S-ro Solà diras ke la hispanaj esperantistoj ne devas esperi amasan ĉeeston de katalunoj al hispana kongreso ĉar por esperantisto estas ĉiam pli alloga la ĉeesto al universala kongreso kiu tre ofte estas pli proksima al nia lando kaj la vojaĝo eĉ pli malmultekosta.

La-Sekretario S-ro Solà legas la raporton pri la tutjara agado de la Komitato:

«Karaj Kunfederacianoj:

Venas la momento kiam la Direkta Komitato de la K. E. F. devas al vi raporti pri sia agado dum la tempo kiam ĝi havis sur si la taskon gvidi nian sociefon. La tasko farita, bedaŭrinde ne atingas la vastecon kiun ni estus dezirintaj, kiam ni prenis sur nin la ŝarĝon de la direktado, sed mi esperas ke ĉiu rekonos ke ni faris ĉion eblan laŭ permeso de la specialaj cirkonstancoj.

Nia unua klopodo, laŭ sperto efektive sukcesinta, estis la restarigo de nia oficiala gazeto «KATALUNA ESPERANTISTO» en ĝia kutima aspekto kaj preskaŭ tute redaktita en Esperanto: tio estis certe tre ŝatata de niaj kunfederacianoj kaj ni esperas ke la zorgoj kiujn la redaktantoj havis por la teksto kaj enhavo estas ankaŭ ĝuste estimataj de la kutimaj legantoj.

Multe da laboro okazigis al ni la organizado de la Kongreso hodiaŭ okazanta kaj nur dank'al la bona volo kaj entuziasmo de S-ro Bofill kaj de nia Prezidanto vi ŝuldas la okazigon de la bela Festo de nia Kongreso. Ni devis por tio kalkuli kun la kontraŭstaro de erarinta hispana sindiranta samideano kiu ne hezitis eĉ per artikoloj en la gazetoj de tiu ĉi gastama urbo kaj per denuncoj apud la lokaj kaj regnaj aŭtoritatoj diskreditigi nian kongreson kaj se eble nebligis ĝian okazigon: vi ĉiuj scias la motivon sur kiu li bazas sian argumentadon kaj vi scias ĉiuj kiel ajn vi private pensas, ke neniu povas rajte riproĉi al niaj kongresoj ian politikan sintenon, sed ke ĉiuj rimarkigis nur pro sia esperantisteco kaj ke en neniu el la urboj de ni iam vizititaj la aŭtoritatoj, el kiu ajn koloro ili estis, havis por ni riproĉon kaŭze de iu aŭ alia tendenco, kiu ĉiam estis for de nia agado kiel esperantistoj.

Vi estas certe informitaj per nia gazeto kaj per la ceteraj esperantaj ĵurnaloj pri la organizo de la esperanta novado aprobita en la Kongreso de Helsinki kaj kompletigita en la Kongresoj de Nürnberg kaj Vieno: en tiu lasta oni aprobis la nuligon de la Konstanta Kongresa Komitato kaj la ŝargon organizi la Internaciajn Kongresojn oni transdonis al la Centra Komitato, organismo elektita interkonsente de la Naciaj Societoj kaj de U. E. A. La Delegito de la K. E. F. en la Kongreso en Vieno voĉdonis favore al tiu ĉi propono, kiu estis aprobita kun la konsento de ĉiuj naciaj societoj esperantistaj.

En la Kongreso en Vieno, mi portis la reprezenton de la K. E. F. kaj ĉeestis la kunsidojn de la Konstanta Reprezetantaro; interese estas diri ke el la Hispana Preskaŭinsulo sole la K. E. F. pagis sian kotizaĵon al la Centra Komitato kaj sekve rajtis voĉdoni en la Kunveno: pri la aferoj diskutitaj kaj aprobitaj en tiuj kunvenoj mi jam faris raporton en K. E. kaj sekve ĉiu siatempe estis pri tio informita.

Estas mia devo hodiaŭ protesti antaŭ vi kontraŭ la agado de S-ro Mangada kiu tute senrajte alprenis sur sin la taskon alparoli la Kongreson en la Solena Malferma Kunsido en la nomo de la kataluna esperantistaro kaj kiu en kunveno de la grupo en Salzburg malpermesis sub minaco de skandalo kaj uzante sian aŭtoritaton kiel regna delegito, ke iu kataluno parolu tie: vi scias pri tiu afero ke ni sendis proteston al la Centra Komitato kaj vi havis jam okazon legi en nia oficiala organo la kontentigan respondon ricevitian.

La Direkta Komitato de K. E. F. kredis necesa por la plej bona efektivo de sia tasko la reformon de nia regularo. Por tio ni publikigis en nia gazeto la proponon de la Komitato kaj kunvokis Eksterordinaran Kunvenon, kiu okazis en Barcelono la 21an de Decembro de la lasta jaro; tie la projekto, kun kelkaj ŝanĝoj kiujn oni kredis necesaj, estis aprobita kaj la nova re-

gularo aprobita de la provincestro estis diversfoje presita sur la kovertoj de nia gazeto kaj certe de vi ĉiuj jam konata.

En la sama kunveno oni diskutis kaj aprobis nian sintenon kontraŭ la Iberia Esperantista Federacio, sinteno kiu permesas al ni interkonsenti ĉiam pri kuna laboro sen la devigo de materia aliĝo kiun ni ne konsideras necesa nek konvena.

En la kunveno oni kompletigis nian Direktan Komitaton, laŭ la ĵus aprobita regularo, per la saĝa elekto de niaj fervoraj amikoj S-roj Isidre Torrents kaj Lluís Domènech.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en Córdoba la Hispana Kongreso al kiu nia amiko S-ro Artur Domènech veturis kaj salutis en la nomo de la katalunaj samideanoj. Okazis ankaŭ antaŭ semajno Kunveno de Konstanta Reprezentataro kaj Konferenco por la Uzo de Esperanto en Komerco kaj Scienco; tiuj okazintaĵoj estas partoprenitaj de nia reprezentanto S-ro Gili.

Krom nia kutima laboro en la administrado kaj zorgado de la Federacio ni okazigis ankaŭ publikajn paroladojn kaj helpis per paroladistoj la grupojn kiuj tion petis okaze de lokaj propagandaj festoj. Ankaŭ multon ni faris en la propagando en la gazetoj kaj certe ĉiuj vi estas rimarkintaj ke ĉiam pli kaj pli ofte notoj pri la esperanta movado aperas en la ĵurnaloj en Barcelono. Ni klopodis ankaŭ kaj helpis en la propagando de Esperanto en la Radio-Studio en Barcelono, propagando kiu certe donos vastan fruktadon, ĉar ĝi permesas al ni atingi mediojn kiuj restis al ni fermitaj kaj alparoli personojn alimaniere neatingeblajn.

Jen estas la raporto de la tasko efektivigita dum unu jaro, cetere nekontentiga por ni kiuj pli multon celis; tamen mi esperas ke nia bona volo estos almenaŭ de vi ŝatata kaj estimata.

Kun aplaudoj ĝi estas aprobita.

S-ro Gili raportas pri la Konferencoj por Esperanto ĵus okazintaj en Parizo kaj kiujn li ĉeestis kiel reprezentanto de nia K. E. F. Oni aprobas lian agadon kaj oni esprimas dankon por la tasko.

S-ro Solà parolas pri la sistemo de voĉdono en Konstanta Reprezentataro, afero aludita de S-ro Gili en sia parolado, kaj miras ke en Parizo oni sumis al la anoj de la Naciaj Societoj tiujn de U. E. A. S-ro Grau ankaŭ petas klarigojn pri tio kaj oni decidas daŭrigi tiun diskutadon kiam S-ro Kreuz estos alveninta.

Nia kasisto legas la bilancon publikigitan en la lasta numero de nia gazeto kiu estas unuanime aprobita.

S-ro Alberich raportas pri la dekreto de la provincestro kiu devigas sendi la insignojn kaj stampilojn por aprobo. S-ro Jaume Grau pledas por ke nia malnova stampilo estu konservata; en la diskutado kiu fariĝas longa intervenas S-roj Gili kaj Dalmau. Tiu lasta proponas ke la afero estu pristudata de la Komitato. Fine ĉar neeble estas momente interkonsenti oni decidas prokrasti la diskuton.

Je la oka vespère la Prezidanto fermas la kunsidon.

IIª LABORKUNSIDO

La duan tagon de la Kongreso, matene je la naŭa en la sama sal-ono estas malfermita la Ferma Kunsido.

S-ro. Kreuz donas la klarigojn atendatajn pri la sistemo de voĉdonado en Konstanta Re prezentantaro kaj konsilas peti pri tio respondon de la Centra Komitato.

Oni transiras al la elekto de la novaj komitatanoj. Post kelkaj diversaj proponoj pri nomoj de taŭgaj kunfederacioj la jena Direkta Komitato estas unuanime elektita: Prezidanto: Delfi Dalmau; Vicprezidanto: Marian Solà; Sekretario: Eduard Capdevila; Vicsekretario: Conrad Domènech; Kasisisto: Jaume Herp; Administristo: Josep Alberich; Kalkulisto: Ramon Marsà; Voĉdonantoj: Lluís Domènech, Isidre Torrents, Joan Prat, Josep Ventura.

La Prezidanto anoncas ke neniu urbo sin proponis por organizi la venontan Kongreson kaj la Feston de la Floraj Ludoj. S-ro. Gili proponas ke oni okazigu la venontan en Sabadell. S-ro. Comadran, Prezidanto de la grupo en Sabadell, rezignas pri tio pro lokaj kaŭzoj. S-ro. Jaume Grau proponas okazigi ĝin en Barcelono. S-ro. Dalmau respondas ke li ne kredas tion oportuna kaj ke oni intencas, se iam okazos Internacia Kongreso en Madrido, aranĝi Antaŭkongreson en Barcelono kaj tiam ankaŭ nian Katalunan Kongreson. Fine oni decidas lasi al la Komitato la taskon elekti taŭgan urbon por nia venonta Kunveno.

S-ro. Comadran petas ke la Komitato zorgu pri la eldono de lernolibroj kaj ke oni klopodu aranĝi propagandon en Lleyda kaj Tarragona. S-ro Dalmau respondas ke la intencoj de la Komitato iras ja tiun direkton, sed oni ne povas multe fari pro manko de mono kaj la propagando en tiuj provincoj estas afero ne de manko de propagandistoj sed de manko de bonvolemaj personoj por instrui la lingvon.

Oni decidas esprimi dankon al la «Associació per la Cultura de Mallorca» por la afabla gastigo de nia kunveno kaj, sendi telegramon al D-ro Privat dankante lin por lia senlaca laborado por Esperanto.

S-ro. Gili parolas pri la presado de la Kataluna Antologio kaj petas ke oni subskribu akciojn, kion faras la plimulto de la ĉeestantoj. S-ro. Kreuz petas al ĉiuj esperantistoj aliĝi al U. E. A.

S-ro. Bofill dankas por la ĉeesto al ĉiuj kongresanoj.

S-ro. Dalmau deziras en la nomo de ĉiuj kunfederacioj montri sian dankon kaj estimon al organizanto de la Kongreso, S-ro. Narcís Bofill, kaj por tio proponas ke li estu elektata Honora Membro de la K. E. F. Longaj aplaŭdoj subtenas la proponon.

La Prezidanto fermas la kunsidon je la deknua matene.

Pretigu por la Universala Kongreso 31 julio—9 aŭgusto en Genève.—
Kaj por la XIIIª K. E. F-a en Santa Coloma de Farnés en majo-junio 1926.

XI-a Internaciaj Floraj Ludoj

23 majo 1925.

«Teatro Principal», la plej bela teatro en Palma de Mallorca, vestis sin feste por akcepti la eksterordinaran solenaĵon. Ĉe la fasado de la teatro pendis multaj girlandoj, kiuj donis plian reliefon al la beleco de la konstruaĵo. La interno estis kvazaŭ ĝardeno kaj la scenejo, kun la majstra aranĝo de floroj, arbetoj, flagoj, k. t. p., rave altiris la rigardon de la multnombra ĉeestantaro.

La naturo ankaŭ volis esprimi sian aliĝon al la Festo, kaj ni ĝuis helan majan tagon, kiu sorĉe revigis nin pri amo kaj feliĉo.

Je la 11-a, la reprezentanto de la urbestro kune kun la prezidanto de la O. K. la Juĝintaro kaj urbaj eminentuloj eniris kaj sidiĝis ĉe la scenejo, kaj kiam silente la ĉeestantaro kun emocio atendas la komencon de la Festo, la reprezentanto de la urbestro elparolas: «Oni komencas la feston.»

La sekretario, S-ro. S. Alberich Jofrè, stariĝas kaj alpaŝinte al tribunon, dekstre de la scenejo, eklegas:

«Gesinjoroj:

En septembro de 1909 por la unua fojo la katalunaj esperantistoj koniĝis al la tutmonda samideanaro la ĉarmon kaj dolĉecon de Floraj Ludoj. Post tiu glora unua ŝtono al la monumento Poezio, kies plej altan lokon okupis Sino. Marie Hankel kiel reĝino, diversfoje la rigardo de multaj poetoj kaj verkistoj turniĝis al nia lando sopirante al la Festo, en kiu kuniĝas Poezio kun Belo pere de la Reĝino, simbolo de Amo kaj Pureco.

Rigardante la amason da verkoj, kiuj okaze de ĉiu Festo venas el tiel diversaj landoj, oni tuj konstatas kiel trafe divenis la unuaj organizintoj de niaj festoj. Se la Floraj Ludoj sukcesis en Katalunujo revivigi la iam velkantan katalunan lingvon kaj sukcesis ankoraŭ doni al ĝi vigecon kaj kapablon, kiu naskas envion ĉe aliaj eŭropaj lingvoj, por Esperanto ĝi estis nova puŝo antaŭen por pliriĉigi la jam multnombrian verkaron kaj por aŭdiĝi tra la mondo la reliefan belecon de nia internacia Poezio.

Legante la valorajn verkojn la penso flugas renkonte al la landoj, kiuj donis inspiron al la verkintoj. Se en Katalunujo la poetoj ĉerpas inspiron el Montserrat kaj Montseny, el la bluo de la maro kaj el la bluo de la ĉielo, kiu tie malproksime kuniĝas kun la unua formante harmonian tuton, ankaŭ ekster la limoj starigitaj de la homoj por disigi nin laŭ rasoj, lingvoj kaj moroj, la bluj horizontoj desegniĝas, la montopintoj fiere altiĝas kaj la verdo de la kampoj senfine etendiĝas por ame akcepti la poetojn kaj doni al ili inspiron, sian ĉarmon, sian virgecon, siajn florojn.

La floroj, kiuj diverskoloro desegniĝas en nia bukedo, havas parfumon plej allogan, plej ĉastan. Ĉiu floro travivis en sia patrujo ventojn aŭ ventegojn, neĝon aŭ sunvarmon, sed ĉiu el ili venkis la barojn kaj fiere sin for-

donis al la Reĝino de la Floraj Ludoj por plireliefigi ŝian belecon, por pliharmoniigi la kanton al ŝia senmakuleco kaj pura amo.

Por nacia lingvo nia festo estas signo de spirita forto kaj patrujamo: por Esperanto ĝi estas privo de ĝia literatura potenco, kiu ĉiujare fariĝas pli riĉa kaj grava. Por nia sankta afero la Internaciaj Floraj Ludoj estas fonto de bonodora travidebla akvo, kiu saturas kaj surverŝas la kampojn de floro-poezio kaj revivigas ĉiujare la liron de la poetoj, kiuj genufleksante oferas ĉe la trono de nia amata Reĝino la frukton de amaspiroj kaj revoj.

Tiel longe kiel la homo vivos sur la tero, la liroj de l' poetoj aŭdiĝos por kanti la Belon kaj la Amon. Ni de longe estos atingintaj la eternan dormon kaj ankoraŭ tra la aero flugos la murmuo de la deklamantoj kaj la dolĉa rideto de ĉiam juna Reĝino prezidos la Florajn Ludojn.

Kaj jen la destino donis al Poezio la plej bonan esprimilon dank'al la genio de Zamenhof, kiu tiel feliĉe kuuligis la sonojn por krei artefaritan lingvon, kies artefariteco superas ja la naturecon de multaj naturaj lingvoj. La infana pretendo de kelkaj naturaj lingvoj fariĝi internaciaj estas ja vere ridinda, ne nur pro la granda gramatika ĥaoso reganta en ĉiu el ili, sed pro la simpla fiero, kiun sentas ĉiu popolo por sia lingvo, por sia vera trezoro, la sola, kiun ne povas renversi la envio, la netoleremo, la subpremo de unu gento super alia, kaj kiun eĉ la logiko kaj rezonado ne povus forigi.

Ni aldonu ankoraŭ ke la nunaj Floraj Ludoj havas kiel scenejon la plej belan lokon, kiun oni povus trovi por inde akcepti la grandan feston de Poezio, kaj ni konstato kia feliĉo estas por ni, kiuj povas ĝui propraokule la ĉarmon kaj belon de la XI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj.

Sinjorinoj, Sinjoroj: Kun emocio ni aŭdigas mian voĉon por diskonigi la nomon de la poeto, kiu meritis la plej altan premion. Sro. **Artur Domènech Mas** estas la gajninto de la Natura Floro.

Mia brusto ne plu povas enteni la batantan koron, mia spiro preskaŭ haltas proklamante F-inon. **Catarina Montaner** Reĝino de la Festo. Dankon al la poeto, ke li donis al ni esperantistan Reĝinon. Ni akceptu ŝin kun amo kaj respekto, ni klinu la kapon kaj riverence ŝin levu al la alta trono ĉe kies piedoj ni ĵuras eternan fidelecon."

Sro. Joan Gili Norta, reprezentanto de la laŭreata poeto, kiu bedaŭrinde ne povas ĝui persone la varman aplaudon de la publiko, akceptas de manoj de la prezidanto la Naturan Floron kaj kune kun akompanantaro forlasas la scenejon kaj iras renkonte al Ŝia Reĝina Moŝto por proponi la prezidan tronon.

Fariĝas silento, kiun subite ŝiras varmega aplaŭdado kaj murmuo de admiro: la beleco de nia Reĝino kaj Kortego de Amo, kiu konsistas el fraŭlinoj Teresa Bauzá, Josefa Brignon, Conchita Alou, Pilar Sánchez, Rosa Brignon, Jerónima Oliver kaj infaninoj Francisca Sampol kaj Josefina Mayot, altiras ĉies rigardojn, kiam ili eniras brakon ĉe brako kun la poeto kaj akompanantoj.

Ŝia Reĝina Moŝto sidigas ĉe la trono kaj la Korteganinoj ĉirkaŭ ŝi, formante belegan bukedon.

La sekretario reprenas la legadon de sia raporto:

*Reĝina Moŝto.

Reĝina Kortego:

La lingvo de mi uzata por saluti vin, amata Reĝino, estas riĉa kaj fleksibla, sed mi humile devas konfesi, ke mi ne majstras ĝin laŭ merito de via beleco por interplekti el ĝi bukedon kaj ĝin proponi al vi, kiel pruvon de mia admiro, amo kaj submetiĝo. Al vi, belaj korteganinoj, kiuj havas la feliĉon servi tiel altan Reĝinon, mian respektoplenan saluton.

Ekscelencaj aŭtoritatuloj.

Sinjorinoj.

Sinjoroj:

La nunjaraj Floraj Ludoj ne nur superis la antaŭajn laŭ la nombro da premioj — 43 por eksterordinaraj temoj — sed ankaŭ laŭ la merito de multaj ricevitaj verkoj. El la 111 verkoj ricevitaj ni certe povus citi kelkajn, kiuj efektive ja montras grandan kuraĝon de la sendintoj, sed, kaj tio ne estas alie farebla, ni nepre devas akcepti la laboron de komencanto, kiu eble post konstanta ekzercigado sukcesos altiri la atenton de la juĝantoj, ne per la rimarkinda mallerteco, sed per la alta beleco de la verko. Tra la kribriilo de la Juĝantaro kelkaj manuskriptoj, feliĉe nur kelkaj, per si mem glitis kaj multaj belaj verkoj restis sur ĝi por pliriĉigi la ekzistantan literaturon.

Plenuminte la kutiman antaŭparolon al la raporto pri la premiitaj verkoj mi transiras al la detala priskribo kaj kritikado de la plej valoraj kaj al la disdonado de la premioj al iliaj aŭtoroj:

Originala versaĵo kantanta Amon.

Por tiu ĉi temo ni ricevis 14 verkojn. Tri el ili estas aparte interesaj kaj belaj. La Juĝantaro, kiu ne opiniis unuanime pri la elekto de la plej supera verko, decidis aljuĝi la Naturan Floron al la verko n-ro. 108, devizo «Els ulls són l'espill de l'ànima». Eble la poemo estas tro longa por sia temo kaj tial estiĝas spirmankoj de inspiro, kion eble pleje montras la tria strofo. Ĝi havas tamen, ĉarmajn tre belajn partojn, precipe rimarkindajn en la dua kaj lasta strofoj. La aŭtoro estas Sro. **Artur Domènech Mas** el Barcelona».

Brua aplaŭdo eksonas, kiam la reprezentanto de nia fama kataluna poeto stariĝas kaj alpaŝas la scenejon por deklami la premiitan verkon. Sro. Joan Gili Norta eklegas klare kaj belsone:

Sendu vian paĝon al K. E. F., tuj!

VIAJ OKULOJ

Se estas la rigardo, de l'animo
 vera reflektado,
 l'okuloj viaj estas la esprimo
 de plenperfekto.
 Ho, kiel estas pura l'anim' via,
 ho kiel bela,
 laŭ via rigard' milda, senpasia,
 naiva, karesema kaj anĝela!

L'okuloj viaj de ĉielkoloro,
 de helo brila,
 sub la gracia brovarkaj' el oro,
 velursimila,
 du bluaj elŝiraĵoj ŝajne estas
 de la lazuro;
 du pecoj de ĉielo kiuj restas,
 por ŝirm', en juveluj' el orveluro.

Kiele je l' tagiĝ' rosgut' perlumas
 pro l' sunrebrilo,
 pro senpekeco tiel milde lumas
 via pupilo;
 kiele ne l' sablaron en kvieto
 marondoj frizas,
 tiele de la vivo l' malkvieto,
 pasante kontraŭ ĝi ne l' frunton ĉizas,

Kaj, kiel en lazur' modesta stelo
 kaŝe fajrumas,
 sed trans la blua fundo de l' ĉielo
 tamen ĝi lumas,
 jen tiel, trans la blua fund' de via
 rigard' bela,
 kaŝeme, sed serena, plenradia,
 fajrumas modestec' kun brilo stela.

En via pupil' regas tiu ĉarma
 kaj miroplena
 de ensorĉita virgulin', senvarma
 rigard' serena.
 Ho, kiom da ĉastec', kiom da mildo
 sur min direktas
 l'okuloj viaj kiam mia bildo
 en ili, mirekstaze, sin reflektas!

Jen tiam mia lir', de siaj kordoj
 la tutan gamon
 aŭdigas, kaj per versoj kaj akordoj
 ĝi kantas amon;
 kaj alten, alten, sian kanton levas
 la liro mia,
 dum, forportata de l' feliĉ', mi revas
 en la reviga lum' de l' rigard' via.

Sed kiam vi ne min rigardas, muta
 la liro restas,
 kaj por unu rigard', deziro tuta
 de l'anim' estas
 eĉ de poet' la nomon oferdoni
 en mortsopiro,
 kaj en la fund' de ĝia bluo droni
 kun miaj versoj kaj kun mia liro.

ARTUR DOMÈNECH MAS

Ĝenerala ovacio premias la verkinton de tiel bela versaĵo kaj la sekretario daŭrigas:

«Al la verko n-ro 4, devizo «Kaj Dio la Eternulo...» oni aljuĝas kiel duan premion la duonon de la premio 1 de S-ro Narciso Bofill. La poemo estas bone ritmita kaj rimita, la stilo estas agrabla, kaj flua kvazaŭ bona prozo, sed en ĝi mankas originalaj pensoj. La aŭtoro estas S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

La verko n-ro 107 kun devizo «Asonancoj» havas kelkajn ĉarmajn versojn, frapantajn pensojn. En ĝi asonancas la tri lastaj vokaloj de unua kaj tria versoj. Tio ĉi estas formo ne ankoraŭ uzata en esperanta versfarado, ĉar ĝis nun oni uzis nur la hispanan asonancon konsistantan el sameco de vokaloj, kalkulante de tiu lasteakcentita. En la tuta poemo oni povas trovi eĉ ne unu substantivon kun apostrofo. Al ĝi oni aljuĝas kiel trian premion la premion XLIII, de Ekscelenca Urbestro de Palma. La aŭtoro estas S-ro. **Artur Domènech Mas** el Barcelona.

Oni aljuĝas I-an mencion al la verko n-ro 51, devizo «Se socio pekas, amo krimas» verkita de S-ro. Julio Baghy el Budapeŝto.

II-an mencion meritas la verko n-ro 36, devizo «Laŭ la maniero de Rubén Darío» kies aŭtoro estas S-ro. Jaume Grau Casas el Barcelona.

III-an mencion oni aljuĝas al la verko n-ro 45, devizo «Ami... ami... ami!» verkita de S-ro. Julio Baghy el Budapeŝto.

Originala ama verko en prozo

Kvar verkoj estis ricevitaj por tiu ĉi grupo. Al la verko n-ro 34, devizo «Ni vidas, nenion ni scii povas» oni aljuĝas la premion. La aŭtoro de la belstila, tragedia noveleto, estas S-ro **Josep Berger** el Córdoba.

La sama aŭtoro ricevas I-an mencion por la verko 35, devizo «Polymymnia».

Dua mencio estas aljuĝita al n-ro 23, kun devizo «Amo venkos malpacon», verko de F-ino. Hilde Scholze el Reichenberg (Ĉeĥoslovakujo).

Traduko de la versaĵo La Pastoreta de M. Costa i Llobera

Unu sola traduko estas ricevita. Estas bedaŭrinde, ke niaj enlandaj poetoj ne volis interesiĝi por doni al la kataluna versaĵo plej trafan tradu-

kon. La ricevita verko n-ro 3 kun devizo «Versa tradukado estas re-kreado» feliĉe elpruvas tra la traduko la gracian trajton de la originalo. Al ĝi oni aljuĝas la reston de la premio 1 de S-ro. Narciso Bofill. La tradukinto estas S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona, kiu ĝin majstre legas:

La Paŝtistineto

Aspektis la knabino,
zorgata kun atent',
valora perl' garnita
per oro kaj arĝent'.

Ŝi, blanka kiel perlo
kaj blonda kvazaŭ or',
burĝon' el alta branĉo,
de kie estis flor'?

Ho ve! ke nun ŝi havas
la teron por kusen',
post kiam patro iris
militon, sen reven'.

Duonpatrin' malbona
ŝafpaŝti igas ŝin:
ŝi paŝtas la ŝafidojn
kun ŝafa mol-inklin'.

Ŝi ekster la vilaĝon
la ŝafojn pelas for;
dum ŝpinas ŝi, per kantoj
ĝojigas ŝia kor'.

Ĉe l' gaja sunleviĝo
jam kantas ŝi en val':
je ŝia voĉo sentas
envion najtingal'.

Ŝin aŭdis ja la grafo,
ŝin aŭdis la nobel'
ĉagrene nedormanta
interne de l' kastel'.

— Kia kanzono nova
hodiaŭ ravas min?

— Ĉi tie trapasante
ĝin kantas paŝtistin'.

— Vi iru, do, ŝin peti
kantadi antaŭ mi. —
Post tio, tuj paĝio
direktas sin al ŝi.

— Ĉu vi, la paŝtistino,
min sekvus al Kastel'?
— Mi kion faros tie,
vestita kun malbel'?

— Ne gravas, paŝtistino,
vest' luksa aŭ ĉifon':
vi grafon kontentigos
per nur via kanzon'.—

Timeme ŝi eniras,
konfuza la vizaĝ'...
La graf' ja ŝin invitas,
ŝi restas sen kurag'.

— Se vi, la paŝtistino,
kantadus nun por mi,
vi tiun ringon havus,
el oro, por premi'.

— Sinjor', por mi ne estas
pri via ring' neces'...
Mi iru paŝti ŝafojn
denove, kun permes'.

— Al vi, se vi kantados,
donacos veston mi.
— Eĉ plena de flikaĵoj,
sufiĉas tiu-ĉi.

— Por mia viv', nu, kantu:
ne estos ia don'.
Sinjoro, vi min aŭdis:
jen nun mia kanzon'.—

Ŝi kantis: ŝin aŭskultis
eĉ l' arbara popol',
kai venis sur balkonon
kardelo kaj pirol'.

Kiele ŝin aŭskultis
la ĉagrenita graf'!
Ĉagren' de li foriris
kaj venis dolĉa rav'.

Je ŝia kant' unua,
sur ŝin jam falis flor';
je ŝia kanto tria,
de l' graf' flugis la kor'.

— Ho vi, paŝtistineto,
komplezi volu min;
akceptu... mian manon,
vi estos la grafin'!—

El la kataluna lingvo tradukis
JAUME GRAU CASAS

Entuziasma aplaŭdo de la aŭdantaro premias la leginton.

Traduko de la prozaĵo Via Blanquerna de Llorenç Ribet

Kvar verkoj estas ricevitaj. Aparte rimarkindaj estas du el ili, sed ĉar tiu kun n-ro 9 kaj devizo «Avis Rara» pli bone algustigas al la originalo kaj enhavas tre detalan biografion pri Ramon Llull, aŭtoro de la granda verko «Blanquerna», oni aljuĝas al ĝi la premion II de S-ino. Maria Fornaris de Bofill. La aŭtoro estas S-ro. **Josep Ventura Freixas** el Terrassa.

Mencion meritas la verko n-ro 17 kun devizo «Marrigardejo», kies aŭtoro estas S-ro. **Josep M.^a Terricabras** el Vich.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

La abundeco de premioj por temo laŭvola estis tiel granda, ke la Juĝantaro decidis grupigi la verkojn laŭ simileco de ilia senco kaj celo, kaj en ĉiu grupo doni kelkajn premiojn al la plej meritaj verkoj. Kelkaj grupoj envicigis tiom multajn verkojn, ke oni decidis fari duan kaj trian grupon. Entute ni faris la kutimajn por la Ordinaraĵoj kaj 17 por la Eksterordinaraĵoj.

Jen la rezultato de nia tasko:

Temo XVIII. — Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de valenciaj aŭtoroj. Premio de S-ro. Prezidanto de K. E. | F.

El la du ricevitaj verkoj reliefigas pro sia merito tiu kun n.º 93 kaj devi-

zo «Sóc al país dels tarongers florits». Ĝi enhavas ĝustan tradukon de la versaĵoj unuaj strofoj de Fantasiant de Auzias March kaj «La Batalo de floroj en Valencio» de Miquel Duran i Tortajada. En prozo ĝi enhavas «Pri kiel la sanktuloj volis manĝi fragojn» de E. M. Ferrando. La aŭtoro de tiu ĉi verko, kiu ricevas la premion, estas S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Mencion meritas la verko n^o 28, devizo «Vora el barranc...», bela traduko de «La Dimanĉo de la rozoj» de Eduard L. Chavarrí, kies tradukinto estas S-ro. Josep Ventura Freixas el Terrassa.

Temo XIX. — Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de rusiljonaj aŭtoroj. Premio de S-ro. Sekretario de K. E. F.

Du verkoj estas ricevitaj. La premion oni aljuĝas al n^o 16, devizo «Pax Vobis» Ĝi estas traduko de la bela prozaĵo «La Perdita Ŝlosilo» de Esteve Casadeponce. La traduko havas kelkajn makuletojn, kiujn nur tre malfacile oni povus eviti pro la originaleco de kelkaj esprimoj en la kataluna teksto. Aŭtoro S-ro. **Josep Ventura Freixas** el Terrassa.

Mencion ricevas la verko n^o 89, Devizo «Canigó», konsistanta el du versaj tradukoj kaj studo. Verkinto S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Tradukitaj versaĵoj

Naŭ tradukoj estas ricevitaj. Unu el ili estas aparte meritoplena pro la ĉarma flueco de la versoj kaj ĝia korekteco. Ĝi estas tiu kun n^o 38, devizo «Majfloro» al kiu oni aljuĝas la premion XI de Banko Crédito Balear. La majstra traduko estas farita de F-ino. **L. Briggs** el Armley (Anglujo).

Duan premion, la IX de S-ro Jaume M. Granada, indas la verko n^o 2, devizo «En versfarado formo estas funda» kolekto de ok katalunaj sonetoj, tradukitaj de S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Unuan mencion ricevas la verko n^o 72 kun devizo «Vian ĉielon kovru Zeus». Tri poemoj el Goethe, tradukitaj de S-ro. Wilh. Solzbacher el Honnef (Germanujo). Duan mencion ricevas n^o 76 «Ex abundantia cordis», ses tradukitaj poezioj el kataluna lingvo de S-ro. Jaume Grau Casas el Barcelona. Trian ricevas n^o 86, devizo «Trosevereco estas fiereco». Du sonetoj el hispana lingvo tradukitaj de S-ro. Josep Berger el Kordovo.

Tradukitaj prozaĵoj. (1-a. Grupo)

Naŭ verkojn ni envicigis en tiun ĉi grupon. Tre peza tasko estis por la juĝantaro la analizado de multaj tre ampleksaj verkoj kaj ankoraŭ pli peza kaj malfacila estis ilia laŭgrada envicigado. En tiu ĉi grupo distingigis unue la verko n^o 106, devizo «Konstantinopolo», romano pri la modernaj turkaj haremoj, kiu enhavas multajn paĝojn en nesupereble bela stilo. Ĝi ricevas la premion X de Banko Fomento Agrícola de Mallorca. Tradukis el franca lingvo S-ro. **Marian Solà** el Terrassa.

Duavice ni havas tri verkojn, kies kvalitoj estas preskaŭ la samaj. En ili

la lingvo estas korekta, flua kaj gracia, kaj nur post tre profunda sondado oni decidis aljuĝi tri premiojn laŭ la jena ordo: al la verko n^o 33, devizo «Migrado, jes migrado» bela rakonto el la germana lingvo, oni aljuĝas la premion III de F-ino. Amàlia Bofill Fornaris. Aŭtoro estas nia ĉeĥoslovaka samideano S-ro. **Joseph Berger** el Kordovo.

La verko n^o 32 kun devizo «Felicity» ricevas la premion V de S-ro. Josep Salom. La belan tradukon ni ŝaldas al la facila plumo de F-ino. **L. Briggs** el Armley (Anglujo).

Lasta premio estas aljuĝita al n^o 73, devizo «Plaĉi al ĉiuj neniu sukcesis», ĥina legendo tradukita de S-ro. **Wilmh. Solzbacher** el Honnef (Germanujo). La premio aljuĝita estas la VIII de S-ro. Marian Jaquotot.

Unuan mencion meritas pro sia plena korekteco la verko n^o 91, devizo «Silento estas oro», traduko de S-ro. E. Wiesenfeld el Varsovio (Polujo). Dua mencio estas ricevita de la verko n^o 6 kun devizo «Finis coronat opus» kies tradukinto estas S-ro. Josep Ventura Freixas el Terrassa, kaj trian ricevas n^o 97, devizo «Valoraj pensoj», tradukita de S-ro. Otto Ginz el Praha (Ĉeĥoslovakujo).

Originalaj Versaĵoj (1-a Grupo)

Tiu ĉi grupo enhavas kvar verkojn. Tri el ili estas premiindaj laŭ la jena ordo de merito:

La premion IV de S-ro. Antonio Rosselló oni aljuĝas al la manuskripto n^o 7, devizo «Domine da mihi pacem», poemo de amo kaj doloro, kiu enhavas proksimume 500 versojn. Ĝi estas kolosa laboro de la verkinto, kiu en multaj paĝoj dolĉe sonorigas la liron, dum en aliaj, kelkaj makuletoj forprenas ĉarmon kaj gracion. Aŭtoro S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Al la verko n^o 44 kun devizo «Noktmeza Batalo» pro la belaj pensoj kaj ĝusta ritmo de la versoj oni aljuĝas kiel duan premion tiun de Banko Vitalicio de España. Aŭtoro estas la konata poeto **Julio Baghy** el Budapest (Hungarujo).

La VXI premion, donitan de Fervojo de Sòller, oni donas al la verko n^o 109 kun devizo «No hi fa res que m'enganyis», tre amuza versaĵo de nia poeto **Artur Domènech Mas** el Barcelona.

Mencion meritas n^o 13, devizo «Kial plendi se estas amo?», verkita de S-ro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Originalaj prozaĵoj (1-a Grupo)

La nunaj Floraj Ludoj, laŭ mia opinio, distingiĝas per la kolekto de originalaj prozaĵoj ricevitaj. La 19 ricevitajn verkojn ni disdividis laŭ tri grupoj por pli bone premii la meritplenajn verkintojn. En la unua grupo troviĝas ses manuskriptoj.

Al la verko n^o 59, devizita «Vi estas prava, etulo», estas aljuĝita la

premio XII de Fomento del Civismo. La rakonto enhavas tre belajn paĝojn per kiuj la aŭtoro priskribas frapantajn scenojn inter avo kaj nepineto. Aŭtoro estos Sro. **Ed. Jung** el Strasbourg (Francujo).

Duan premion — XIV de Asociació per la Cultura de Mallorca — oni donas al n.^o 27, devizo «Plumo ne sentas, papero silentas». Kun granda plezuro oni legas la noveleton, verkitan laŭ stilo kaj korekteco, kiujn ni vidis nur en la aŭtoro S-ro. **I. Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

Unuan mencion oni aljuĝas al la verko n.^o 69 kun devizo «Kulpoj de patro persekutas idon», kies aŭtoro estas Fino. **Helena Hempel** el Lwow (Polujo). Duan mencion meritas la verko n.^o 58, devizo «Arbara silento». Aŭtoro S-ro. **Ed. Jung** el Strasbourg (Francujo).

Tradukitaj teatraĵoj

El la du envicigitaj verkoj meritas premion tiu kun n.^o 39 kaj devizo «Maltrankvilo» al kiu oni aljuĝas la premion XVII de Ruĝa Kruco (Santa Catalina). La tradukinto pravas denove sian lertecon. Tiu estas Fino. **L. Briggs** el Armley (Anglujo).

Mencion meritas la dua verko n.^o 75, devizo «Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj», kiun ni ŝuldas al la rimarkinda kapablo de Sro. Josep Ventura Freixas el Terrassa.

Originalaj versaĵoj kantantaj la patrujon

La du ricevitaj verkoj estas majstraj, korektaj, belsonaj, sed ĉar tiu kun n.^o 47 kaj devizo «Komuna sorto» ritmas kaj rimas pli dolĉe oni aljuĝas al ĝi la premion XXVI de Asocio de la Baleara Gazetaro. La aŭtoro estas la potenca poeto **Julio Baghy** el Budapeŝt (Hungarujo).

Mencion oni faras al la dua verko, n.^o 46, devizo «La patrujo super ĉio» kies aŭtoro estas ankaŭ Sro. Julio Baghy el Budapeŝt.

Pacifismo

El la tri envicigitaj verkoj atingas reliefon, kiun ne egalas iu alia verko en tiu ĉi konkurso, tiu kun n.^o 26, devizo «Se ne la "se" malfeliĉa, mi estus homo tre riĉa». La stilo kaj originaleco de tiu ĉi verko donas ideon pri la granda talento de la verkinto Sro. **I. Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo), al kiu oni aljuĝas la premion VI de Sro. Pere Tous.

Mencion meritas la manuskripto 54, devizo «Fata Morgana», verkita de Sro. J. Kramer el Enkhuizen (Nederlando).

Studoj diversaj

La kvin verkoj enhavataj de tiu ĉi grupo estas per si mem pruvo pri la sukceso de niaj Floraj Ludoj. Ili ĉiuj estas de granda merito kaj kun granda atento devis la Juĝantaro ilin studi por trafte disdoni la premiojn.

La premion XX de Episkopa Moŝto de Mallorca oni donas al la manuskripto n.^o 37 kun devizo «Pli da aferoj troviĝas en ĉielo kaj sur tero, ol filozofio klarigas». La verko konsistas el profunda studo pri la verkaro de Shakespeare.

Duan premion — XXII de Ĝenerala Societo de Elektraĵaj Tramveturiloj — oni cedas al n.^o 79, devizo «La Bonuloj el ĉiu nacio havas lokon en paradizo». Per tiu ĉi verko oni faras trafan defendadon de la hebreoj kaj profundan priskribon pri iliaj ecoj. Aŭtoro de la du premiitaj verkoj estas Sino. **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Unuan mencion meritas la verko n.^o 53, «Malofta temo» de Sro. Otto Ginz el Praha (Ĉeĥoslovakujo). Duan indas tiu kun n.^o 66, devizo «Ŝajni — kaj esti, jen diferenco», verko de Fino. Helena Hempel el Lwow (Polujo). Trian oni aljuĝas al n.^o 18 kun devizo «Libri oracula pandunt», kies aŭtoro estas Sro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Popolkantoj kaj moroj

El la kvar grupigitaj manuskriptoj ricevas unuan premion — XXXI de Ĉefoficistoj kaj Oficistoj de Poŝto, Palma — la verko n.^o 95 kun devizo «Vindicamus hereditatem patrum nostrorum». Ĝi konsistas el ĝusta studo pri la kataluna popolkanto kun 14 versaj tradukoj kaj melodioj. Aŭtoro Sro. **Joan Amades** el Barcelona.

Duan premion atingas la verko n.^o 31, devizo «Tapuah», al kiu oni aljuĝas la XXXVIII de Moŝta Kolegio de Advokatoj, pro la imitinda flueco kaj korekteco. Aŭtoro Sro. **J. D. Applebaum** el Liverpool (Anglujo).

Trian premion — XXV de Fomento de Turismo de Palma — meritas la verko n.^o 5 kun devizo «Lingvo sen poezio estas korpo sen spirito: mortintaĵo», kiu kun korekteco priskribas la Balearajn Insulojn, skizas poeton Miquel Costa i Llobera kaj tradukas tri versaĵojn. Aŭtoro Sro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Mencion ricevas la verko n.^o 94 kun devizo «De quan les bèsties par-laven», kies aŭtoro estas Sro. Joan Amades el Barcelona.

Travivaĵoj originale verkitaj

Tiu ĉi grupo enhavas kvin verkojn, kiuj priskribas vojaĝojn, travivitajn scenojn k. t. p. Du verkoj staras super la aliaj kaj el tiuj ĉi du verkoj, kvankam ilia merito estas preskaŭ la sama, meritas unuan premion tiu kun num. 87, devizo «Turbano kaj duonluno». Ĝi per korekta lingvaĵo disvolvas interesan vojaĝon al Maroko. La premio aljuĝita estas la XXVII, de Sro. Fernando Ramirez, kaj la aŭtoro Sro. **Joseph Berger** el Kordovo.

Duan premion indas la verko n.^o 83, devizo «Parolantaj ŝtonoj». Ĝi priskribas scenojn el infaneco, kiujn oni legas kun plezuro. Bedaŭrinde enŝoviĝis iu erareto, kiu restigas la verkon en dua vico. La premio aljuĝita

estas la XXVIII, de Sro. Miquel Guasp. Aŭtoro Sino. **Maria Elworthy-Po-senaer** el Mariaburg (Belgujo).

Mencion oni donas al la verko n.^o 52 devizo «Rememoroj», kies aŭtoro estas Fino. Maria Paz Zamora el Manila (Filipinaj Insuloj).

Originalaj prozaĵoj (2-a. Grupo)

Envicigitaj estas kvin verkoj. La Juĝantaro troviĝis en embaraso por ĝuste difini la meriton de ĉiu verko ĉar ĉiu estas korekta kaj interesa. La definitiva verdikto donis la jenan rezultaton:

Al la verko n.^o 110, devizo «Patrino kaj infano» oni aljuĝas la premion XXI de Oficiala Ĉambro de Urbobieno. La aŭtoro kun stilo tre bela faras patetikan priskribon de suferado de edzo post la morto de amata edzino. Ĝi estas kortuŝa kaj frapanta rakonteto. La aŭtoro estas Sro. **Christian Thoma**, el Köln-Kalk (Germanujo).

Duan premion trafas la verko n.^o 105, devizo «La Fianĉino de la Morto». La fantazio de la aŭtoro facile disvolvas interesajn scenojn de gentoj, kiuj faras por siaj fetiĉoj barbarajn krimojn. La premio aljuĝita estas la XXIX de Sro. Antonio Coll kaj la verkinto Sro. **Antoni Durà** el Barcelona.

Trian premion — la XXXII de Sro. Rafael Blanes— oni cedas al la verko n.^o 41 kun devizo «Fjodor». Tre korekta rakonto, kies enhavo allogas la leganton per la mistero, kiu ĉirkaŭas ĝin kaj kiu je la fino malaperas por doni trafan solvon al la aventuro. Aŭtoro estas Sro. **Theodor Kilian** el Kounice (Ĉeĥoslovakujo).

La premion XXXIII de Moŝta Kolegio de Prokuristoj de Palma oni donas kiel kvaran en tiu ĉi grupo al la verko n.^o 67 kun devizo «Fortuno favoras kuraĝulon», kiu konsistas el ama noveleto kun ŝercoj kaj belaj scenoj. Aŭtoro S-ino. **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Mencion ricevas la verko n.^o 68, devizo «Kio komenciĝas, devas nepre finiĝi» kies aŭtoro estas S-ino. **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Tradukitaj prozaĵoj (2-a Grupo)

Ok manuskriptoj konsistigas la grupon. La jenaj premioj estas aljuĝitaj:

1-a. Al la verko n.^o 101 kun devizo «Ad pedem litteram» oni aljuĝas la premion XXIII de Esperantista Klubo Palma. Ĝi estas traduko tre ĝusta kaj bela el kataluna lingvo kaj ĝia aŭtoro estas **Josep Ventura Freixas** el Terrassa.

2-a. La premio XXXIV de Veloz Sport Balear al la manuskripto n.^o 98, devizo «Amo diverse komprenita». Belstila kaj tre korekta traduko de S-ro. **E. Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

3-an. premion — XXXV de Mallorka Societo Protektanta de Bestoj kaj Plantoj — meritas la verko n.^o 71 kun devizo «La vivo estas sonĝo, kaj la amo la suno de eterna maja tago». Traduko el kroata lingvo farita de la facila mano de Sro. **Fran Janjić** el Vinkovci (Jugoslavujo).

4-an. oni donas al la verko n.^o 111 kun devizo «Amo, plej supera rajto». Ĉar la temo XXX de Esp. Grupo Ĝerona Espero ne estas konkursita, kun permeso de la donacinto oni aljuĝas la duonon de la premio al tiu ĉi manuskripto, kies aŭtoro estas S-ro. **E. Wiesenfeld** el Varsovio. (Polujo).

Mencion rajtas la verko n.^o 92, devizo «Amor omnia vincit», traduko de S-ro. Ed. Wiesenfeld el Varsovio (Polujo).

Originalaj versaĵoj (2-a. Grupo)

Dek-tri verkojn enhavas tiu ĉi grupo.

Al la verko n.^o 50 kun devizo «Ĉiela graco — kora paco» oni aljuĝas la premion XLII de Ekscelenca Deputataro de Balears. Ĝi estas nova brilanto de la talenta poeto S-ro. **Julio Baghy** el Budapeŝto (Hungarujo).

Duan premion — XXXIX de Oficiala Kolegio de Farmaciistoj — meritas la verko n.^o 15 kun devizo «Omne trinum est perfectum». Ĝi bele rimas kaj agrable sonas. Aŭtoro estas S-ro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Estas inda je tria premio — XL de Oficiala Kolegio de Kuracistoj — la verko n.^o 56, devizo «Sankta vesper', paca vesper'», kies sentimentalaj strofoj ĝuste ritmas kaj fariĝas aparte interesa pro la korekteco de la enhavo. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **Christian Thoma** el Köln-kalk (Germanujo).

Al la verko n.^o 12, devizo «Don Dinero» oni aljuĝas kiel kvaran premion tiun de Federaciado Patronal de Mallorca (XLI). La aŭtoro estas S-ro. **Jan van Schoor** el Antwerpen (Belgujo).


Unuan mencion ricevas la verko n.^o 14 kun devizo «La poezia non muore», kies aŭtoro estas S-ro. Jan van Schoor el Antwerpen (Belgujo). Duan meritas n.^o 48 devizo «Larmiginta ĝojo», kies aŭtoro estas S-ro. Julio Baghy el Budapeŝto (Hungarujo). Trian mencion indas la verko n.^o 19, devizo «Suno leviĝas — la mondo reviviĝas», verkita de S-ro. Antono Javorskij el Ostrón (Polujo).

Originalaj prozaĵoj (3-a. Grupo)

El ok verkoj konsistas la grupo. Super ĉiuj brilas tiu kun n.^o 60 kaj devizo «Laboro de l' mano, de l' koro la sano». Belega kaj korekta rakonto per kiu la aŭtoro kantas la belecon de Katalunujo kaj la ĉarmon de mallorkaninoj. La verkinto, S-ro. **Ed. Jung** el Strasbourgo (Francujo), en sia verko rakontas kiom liaj nepoj amas la birdojn, kiujn li mem elfaris por la kristnaska arbo. Iam, antaŭ la mirigitaj infanoj, la avo faris pakajojn kaj sendis la birdojn al la Reĝino de nia Festo kiel pruvon de amo. — Akceptu ilin, amata Reĝino, ĉar la donaco fluigis larmojn el dolĉaj okuloj de infanoj, kiuj vundis la koron de vin amanta maljunulo. La premio aljuĝita estas la XXIV de Oficiala Ĉambro de Komerco.

Al la verko n.^o 25, devizo «Pacienco, energio kaj laboro ĉion venkos» oni aljuĝas duan premion — XXXVII de la Hejmo de l' Estonteco —. Novelo majstre ĉizita de S-ro. **I. Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

K. E. F-a. KONGRESO EN PALMA




Gekongresanoj elire de la Akceptejo.



Grupo de Kongresanoj inter kiuj vidiĝas niaj konataj Bofill, Kreuz, Hrbáčková, Fikrle, Osmond, Berger, k. a.

XII^a KONGRESO DE K. E. F.

Detalo de Esperanta Ekspozicio ĉe Esperanta Klubo Palma.



Alia detalo de la Esp. Ekspozicio ĉe la Esp. Klubo Palma.

KORTEGO DE AMO DE LA I. F. L. EN PALMA



Reĝino kaj Korteganinoj. De maldekstre al dekstre : F-inoj T. Bauzà, J. Brignon, C. Alou, C. Montaner, T. Sánchez, R. Brignon, J. Oliver, kaj infaninoj. F. Sampol. J. Mayol.

Narciso Bofill

Jen nomo kiun ni devas skribi hodiaŭ per plej helaj literoj. Jen animo, jen kolono, jen volo kaj kuraĝo, jen ekzemplo por ebligo de Esperanta sukceso kontraŭ ĉiaj baroj.



Narciso Bofill, heroo de nia Kongreso en Palma de Mallorca.

Dank' al Narciso Bofill nia Kongreso en Palma estis ebla kontraŭ ĉies opinio konanta la specialajn cirkonstancojn en tiu bela katalunlingva urbo, ĉefurbo fama de la baleara insularo, mediteranea perlaro, definitive konkerita de la Kataluna Reĝo Jako I la Konkerulo, en la komenco de la XIII^a jarcento. Se tiu fama Reĝo konkeris Balearon por la Katalunaj lingvo kaj kulturo, Narciso Bofill konkeris tiun insularon por Esperanto.

Narciso Bofill, ĉarma civitano el Mallorca, inĝeniero, posedanto de minoj, pioniro de nia Movado pruvis al plej skeptikaj samideanoj, ke unu sola energia, malavara, fervora esperantisto en plej malfavoraj cirkonstancoj povas sukcesigi Kongreson

de nia Federacio kaj varbadon por Esperanto.

En la Historio de nia Movado, la nomo de nia amiko brilos plej hele, kaj lia ekzemplo montros al ĉiuj la efikon de energio kaj sindonemo por Idealo.

En nia memoro neniam malaperos la nomo de Narciso Bofill, nomo de pioniro, de samideano, de amiko kaj de Honora Membro de nia Federacio.


Ĉia sukceso, atingita

Malgraŭ denuncoj faritaj kontraŭ ni al ĉiuj Palmaĵ Aŭtoritatuloj, dank' al la lerteco de la Prezidanto de la Organiza Komitato, ne nur ili sin detenis de malhelpo al nia Kongreso, sed kontraŭe, la urbestro S-ro Llopart kaj la Prezidanto de la Deputitaro donis premiojn por la Floraj Ludoj kaj akceptis la honoran membrecon de la Kongreso, kaj en ĉiuj festoj estis inter ni reprezente de la urbestro, la urbkonsilanto S-ro Fiol, kies afablecon ni plezure kaj danke memoras. Ankaŭ akceptis la honoran membrecon de nia Kongreso lia Episkopa Moŝto de Palma, kaj nian Festenon ĉeestis la Prezidanto de la Aŭdienco. Ili ĉiuj povis konstati ke K. E. F. estas speciala organizaĵo pure esperantisma por la katalunlingvaj teritorioj, kaj eĉ, post la Kongreso, la urbkonsilantaro en ĝenerala kunsido voĉdonis akte esprimi plezuron pri la Kongreso de nia Federacio tiel sukcese okazinta en Palma.

La bela lando, la Floraj Ludoj, la fervoro de la katalunoj, nia Federacio, la famo de niaj kongresoj, la speciala intereso pro la malfacilaĵoj starigitaj kontraŭ la tasko de la organizinto de la XII^a altiris grandan atenton kaj scivolemon pri nia Kongreso en Palma. Kaj tial ni havis la ĝojon saluti alilandajn samideanojn ekz. S-ron Fikrlé el Bratislava, S-inon A. Hrbáčková el Zlín, S-ron Josep Berger, sekretarion de la Iberia Kongreso en Kordovo, la konatan verkistino Emma L. Osmond, kaj Drinon. Grogan el Anglujo, kaj la Sekretarion de la Centra Komitato, kaj de la proksima Universala Kongreso de Esperanto en Genève, S-ron Robert Kreuz. Bedaŭrinde aliaj, kiel nia klera hungara samideano Jozefo Major, ne povis veni pro malfacilaĵoj ĉe hispanaj konsuloj.

Cetere la sukceso de nia Kongreso en la bela Mallorca estis tiel eksterordinara, ke de ĝia okazo ĝis nun aliĝis al la Esperanta Klubo Palma pli ol 50 novaj membroj, kaj nia samideanino Catarina Montaner, la Reĝino de la lastokazintaj Floraj Ludoj, gvidas kurson de Esperanto en tiu Klubo kun vera sukceso. Fine ni diru ke ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj el Palma publikigis tre favorajn impresojn pri nia Movado, kaj merititajn laŭdojn al la heroo de la Kongreso, Narciso Bofill.

La Komitato de K. E. F. publike esprimas sian grandan ĝojon pri la paŝo antaŭen al nia venko, kiun signifas la XII^a Kongreso, la Palma, la glora Kongreso.



Kavernoj ĉe Manacor.—Teatro de la Feinoj.

Ekskursa Vizito


de la

K. E. F-aj

Kongresanoj

en

Mallorca



Kavernoj de Manacor—Loko nomita «La Kapelo».



Artur Domènech, poeto premiita je la Natura Floro en XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Kongreso
de K. E. F.
en Palma
en
Majo de 1925



F-ino Catalina Montaner, Reĝino de la XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj.



Grupo de gekongresanoj ĉe la Granda Hotelo en Palma.

La Proksima Kongreso de K. E. F.

Nia XIII^a Kongreso okazos en Santa Coloma de Farnés, kiu estas el la plej belaj lokoj en Katalunujo: ĝi estas apud la fama montaro kaj ekskursejo Montseny, kaj tie estas la granda Banejo Termes Orion kun granda hotelo kaj amuzejo, kiu ebligos plaĉegan loĝadon de centoj da kongresanoj.

Niaj samideanoj en Santa Coloma pretiĝas okazigi la XIII-an Kongreson de K. E. F. inda je la antaŭaj kaj je la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj, kies prezido estas proponita al nia eminenta pioniro D-ro Edmond Privat.

La jenaj mencioj estas aljuĝitaj:

Unua al la verko n.^o 61, devizo «Beninda malsato», aŭtoro S-ro. Ed. Jung el Strasbourg (Francujo), kiu bele priskribas la Balearajn Insulojn. Dua al n.^o 65 kun devizo «Lori», korekte verkita de S-ro. Christian Thoma el Köln -- Kalk (Germanujo) Tria al n.^o 57, devizo «Supren la kapon», kies aŭtoro estas S-ro. Ed. Jung el Strasbourg (Francujo).

Por la temo «Lernolibro por katalunlingvanoj» ni ricevis unu solan verkon. Ĝi portas devizon «Natura» kaj n-ron. 43. Kvankam ĝi tre kredeble ne donus sufiĉe kontentigan rezulton praktikan, ĝi meritas premion — XIII de Caja de Ahorros y Monte de Piedad de Belears — pro la korekteco kaj granda laboro de la verkinto, S-ro. **Josep Rosselló** el Palma.

Krom la pli supre aludita temo de Esp. Grupo Ĝerona Espero estis ne konkursitaj la temo VII, premio de S-ro. Miguel C. Oliver, kaj la XXXVI de S-ro Bartolomé Font.

Post la datolimo por la akcepto de verkoj estis ricevita citinda versaĵo, kies aŭtoro estas S-ro. Saito Ĉikara el Tokio (Japanujo).

— Jen, estimataj gesinjoroj, la rezultato de la XI Internaciaj Floraj Ludoj, kiuj, kiel mi diris ĉe la komenco, havas la feliĉan ŝancon okazi en la plej bela loko de nia lando, kaj vi, aŭskultantoj, povas atesti ke la kvalito de la deklamitaj poezioj estas inda je la loko.

La peza tasko de la Juĝantaro, kiu en la daŭro de mallonga tempo devas pesi tiom multajn verkojn — oni rememoru ke ĉiujare la manuskriptoj devas vojaĝi al eksterlando kaj ke tio forprenas multajn tagojn — disvolvigis sen baroj kaj ĝustatempo oni povis publikigi la verdikton. Sed ĉar en la rapido ne ĉiam oni ĝuste povas doni sian opinion, estus konsilinde ke en la estontaj Ludoj oni donu al la Juĝantaro pli longan tempon por la plenumo de ĝia tasko aŭ, se tio ne estas ebla, oni limigu la amplekson de la akceptotaj verkoj. Inter la 111 manuskriptoj ricevitaĵoj por la nunaj Floraj Ludoj troviĝas kelkaj verkoj, kiuj postulas kelkajn horojn por fari profundan juĝadon.

Pro tio, pro la granda laboro, kiu pezas sur ĉiu juĝanto, ni devas danki plej multe S-rojn. J. Schmid el Bern kaj Kolomano de Kalocsay el Budapeŝto, kiuj konsciante la respondecon de la posteno, faris tre atentan kaj meritplenan verdikton.

Al la multaj verkistoj, kiuj ricevis premion aŭ mencion, ni ankaŭ dankas por la honoro, kiun ili donas al la ĉiam kreskanta internacia literaturo. Dankon kaj kuraĝigon al tiuj, kies nomoj ne sonis en la Poezia Festo. La tro severa, tamen saĝa opinio de S-ro Schmid, kiu en sia raporto diris ke multaj konkursantoj ne konas la gramatikajn elementojn, ne koncerneas vin, poeto ne konita, ĝi povas nur koncerni du aŭ tri konkursintojn, kiuj vere ne konas la A. B. C. de nia gramatiko.

Ĉiuj rajtas partopreni nian feston, tiom pli ke la Internaciaj Floraj Ludoj ne fermas la pordojn al kompetentuloj, t. e. L. K. kaj Akademianoj, kiuj ja facile povas renversi la ceterajn konkursantojn.

Dankon al vi, sinjoroj ĉeestantoj, kies aplaŭdoj kaj gratuloj huragiĝas

la premiitojn kaj la organizantojn, kaj fine dankojn, plej korajn dankojn al vi, amata Reĝino kaj altrangaj korteganinoj; via regado en la Templo de Poezio estas mallonga, sed ni, viaj adorantoj, ĉiam gardos vin en la plej profunda loko de nia koro kaj kun nostalgio sopirados al tiu ĉi feliĉa momento, dum kiu ni ĉiuj estas ravataj de la dolĉaj radioj de viaj okuloj».

La diversaj premiitaj aŭtoroj aŭ iliaj reprezentantoj supreniris la scenejon kaj ricevis de la Reĝino la aljuĝitajn premiojn. Diversaj versajoj estis deklamataj kaj aŭskultataj kun granda atento de la multaj geesperantistoj, kiuj plenigis la tutan parteron de la teatro. Apartan ovacion ricevis S-ro. Robert Kreuz, kiu reprezentis S-ron. Christian Thoma.

Aplaŭdon meritis ankaŭ la sekretario post la legado de la raporto.

S-ro. Dalmau en la nomo de la prezidanto de la XI Internaciaj Floraj Ludoj starigas kaj legas lian paroladon el kiu li katalune klarigas kelkajn fragmentojn por la multaj ne esperantistoj, kiuj ĉeestas la Feston:

Kara festa kunveno

Nia amata cindrulino, la Esperanta poezio, kiu estas de multaj flankoj rifuzata, rigardata kiel ĥimero, ĉiun jaron unufoje estas savata el sia cindrulina sorto. Ĉiun jaron unufoje malfermiĝas antaŭ ŝi la pordoj de revolando, kie ĉiuj koroj por ŝi batas, ĉiuj okuloj por ŝi ĝojlarmas. Kaj ŝi, enkorpiĝinte en la ĉarma reĝino de Floraj Ludoj, ĉirkaŭate de brila kortego fraŭlina, festate de poetoj ĉeestantaj kaj foraj, admirate de entuziasmaj aplaŭdantoj, ĉirkaŭrigardas inter siaj adeptoj kaj ĝoje diras: Mi estas devove en Katalunujo, mi hejmenvenis.

Ĉar vere ĉi tie ŝi estas hejme, ĉar nenie ŝi havas tiom da fidelaj koroj kiel tie ĉi. Kaj korojn ŝi bezonas por vivi, korojn kiuj ŝin amas, kiuj por ŝi oferas. La fido, la entuziasmo ŝin nutras, la malfido, la skeptikeco velkigas la rozojn de ŝiaj vangoj. Kaj oni devas ŝin ŝirmi kaj gardi, ĉar ŝi ne estas ankoraŭ forta kaj riĉa. Sed, mirinde, ĉiu nova koro, kiu petas de ŝi donacon de Belo, pligrandigas ŝian riĉecon. Jen, kiel riĉa ŝi fariĝis nun pro la multaj koroj, kiuj petante aliras ŝian tronon. Reĝino ŝi estas, vere reĝino, ni klinu nin antaŭ ŝi jubilante, kun respekto kaj admiro.

Kaj ĉi tiu respekto kaj admiro, kiu radias el la feste brilantaj okuloj, muzikas el la jubile batantaj koroj, ne estas vane malŝparataj. Ĉar se la Esperanta poezio bezonas niajn korojn, tiom pli bezonas niaj koroj ŝin, kiu en nia benata batalo portas por ni magian armilon, la potencan inspiron forton de l' Belo. Miraklon ŝi faras por nia bono: el grizaj vortoj, novaj gramatikaj reguloj, el sekaj senvivaj skemoj, per la tuŝo de ŝia magia bastono, estigas vibrate vivanta estaĵo, en kiu oni mire rimarkas la pulsbaton de l' Koro. La lingvo, kiu ĝis tiam konsistis kvazaŭ nur el sekaj formuloj, taŭgaj nur por sekaj konstatoj pri la *eksterhoma* mondo, akiras subite kolorojn riĉajn, nuancojn freŝajn, tonojn profundajn, penetras en la mallumojn de tiu mondo, eĉ al ni mem nekonata, kiun ni portas en ni. Kaj kiam nian animon

unue vibrigas sentoj per ĝi inspiritaj, aŭ kiam ĝi unue donas vortojn por niaj duonklaraj sentoj, tiam kun kortuŝa surprizo ni rekonas en ĝi kvazaŭ la dolĉecon de nia lingvo patrina, ian neklarigeblan, korkaresan ĉarmion. Ni scias Esperanton, kiam ni finis ĝian lernolibron, sed ni posedas ĝin nur kiam la unuan poemon ni elĝuis. Kaj de tiam ankaŭ Esperanto posedas nin neforŝireble.

Unu el la geniaj trovaĵoj de la Majstro estis ke Esperanton antaŭ ĉio li fianĉigis al la poezio. Per ĉi tio li spiris la vivon en la argilfiguron de la verko. Kaj per ĉi tio li turnis sin ne al la *menso* de la homoj, kiu en sia sinfido ofte fuŝas kaj detruas, sed al la sola bona en ili: al ilia *sento*. Kaj vere, la homa menso faris ĉirkaŭ Esperanto nur malsaĝajn mokojn, malhelpajn atakojn, fuŝajn reformprojektojn. La *sento* ŝirmis Esperanton, la sento, esprimata per poezio, donis al Esperanto tian kuntenantan forton, kian al la patrujideo donas la komunaj rememoroj, doloroj, ĝojoj, aspiroj, entuziasmoj. Lingvo kaj sento: jen estas Esperanto. La lingvo vivas en sia literaturo, la sento parolas per la poezio. Sen poezio, sen literaturo Esperanto estus muta kaj morta.

Sed ĉu Esperanto estas taŭga por poezio? Al vi, kiuj vivas nun en la entuziasmo de ĉi tiuj belegaj tagoj, tiu ĉi demando ŝajnas ridinda. Alie mi devas fari la demandon: Kiamaniere estas eble ke la artefarita Esperanto estas taŭga por poezio?

Komence estis la sento — tiel oni devus komenci la historion de Esperanto. Kaj tiam okazis neklarigebla mistero, kiun ne povas koni kaj tial ne povas kredi tiuj, kiuj staras ekster la lingvo. La sento penetris la gramatikon, la vortaron. La dolĉa alterno de sonoj, la molaj j-literoj, la sonoraj ĉ-literoj, la akcento pulsanta kvazaŭ korbato kaj aliaj neklarigeblaj nur senteblaj detaloj en la lingvostrukturo faras jam unuavide impreson de ĉarmo, de hejmeco. Aliaj projektoj segas per sekaj *so*, tedas per monotonaj *no*, ĝemas per multegaj pinglopikaj *i*; en Esperanto estas ne nur harmonio, sed ankaŭ varma senpereco, kara aromo, afabla humoro, ĉarma senpreteco. La ceteraj projektoj sonas apud ĝi kvazaŭ matematika formulo apud soneto.

Sed la sono ne estas sufiĉa, oni povus diri. Anatole France tute rifuzis la rajton de Esperanto pri poezio. Al la vortoj de la naciaj lingvoj ligigas rememoroj, asociacioj, kiuj kolorigas ilin, donas al ili kaŝitan energion, tiel ke la preciza traduko de la respektiva vorto ne povas havi la saman efektan ĉar tute aliaj rememoroj estas al ĝi ligitaj. Kaj en artefarita lingvo la vortoj tute ne vekas asociaciojn, ili estas sennuancaj, abstraktaĵoj, do traduko en kia ajn artefarita lingvo povas esti nur fuŝo de la originalo. Esperanto restu ĉe la komerco.

Same, kvankam pli bonvole, opinias ankaŭ la granda estona verkisto Friedebert Tuglas.

Nu, ĉi tiu rezonado, konsekvence, kondukas al la kondamno de ĉiu traduko. En ĉiuj lingvoj estas vortoj tiel riĉenhavaj, tiel plenigitaj de asocia-

cioj, ke ilin neniu alia lingvo povas perfekte reprodukti. Per sola vorto oni povas aperigi tutan epokon de historio, per arkaismo oni povas vekti jen impreson de pieco, jen tonon ŝercan aŭ mokan. Mirinda materialo ja estas la lingvo! Kaj ĉu tiujn ĉi efektojn povas nepre ĝui tiu, por kiu la respektiva lingvo ne estas lingvo gepatra? La vorto por li ja estos simpla vorto, sen la riĉaj asociacioj, nur kun sia nuda senco. Do, konsekvence, ne nur ĉiu traduko fuŝas la verkon, sed ankaŭ ĉiu lego de fremdlingvulo. Sekve - ĉiuj antikvaj verkoj estas fuŝitaj, ĉar ili apenaŭ havas plu kompetentajn legantojn. Nu, kiel la alilingva, tiel ankaŭ la Esperanta tradukanto devas fari kompromisojn ofte tre dolorajn. Sed, ekzemploj tion montras, Esperanto estas multe pli kapabla ol oni kredus teorie. En lertaj manoj ĝi povas disvolvi fortajn kaj delikatajn efektojn, vekti sincerajn sentojn, kaj — jen la plej granda afero — tute forgesigi sian artefaritecon.

Ĉar la Esperantaj vortoj ne estas tiel abstraktaj, pendantaj en aero, kiel oni opinias sen la kono de la lingvo. Unue, la Esperantaj vortoj estas prenitaj el vivanta materialo, por ke ni diru komparon, ili ne estas floroj faritaj el papero, sed floroj plantitaj en vazon. Ili daŭrigas tie sian antaŭan vivon kaj ju pli multa fariĝas ilia tero, (la Esperanta literaturo), des pli ili disbranĉos kun riĉaj asociacioj kaj rememoroj.

Ĉar ĉi tiuj vortoj estas prenitaj el internacia materialo, jam dekomence ili enhavas ĉiujn asociaciojn internaciajn. La biblio, la antikva mondo, la ĝenerala moderna kulturo provizas multajn vortojn per nuancoj ĉie senteblaj. En lerta mano ĉi tiuj nuancoj povas havi surprizajn efektojn.

Kaj, kio donis la asociaciojn al la nacilingvaj vortoj? La historio, la moroj, sed precipe la literaturo. La sama efiko de la samaj faktoroj estas ja atendebla ankaŭ en Esperanto. La historio de nia movado, la komunaj aspiroj kaj esperoj, niaj kongresoj, nia publika vivo iom post iom riĉigis kaj riĉigos multajn vortojn per specialc Esperanta kromentlavo. Kaj la efiko de la verkistoj devas same manifestiĝi, kiel en la naciaj lingvoj. La tradukoj kvazaŭ perforte trudas al la lingvo konstantan penon: esprimi la ĝis tiam neesprimeblan. Kvazaŭ transfluigata sango en anemiulon, fluas per ili en ĝin novaj esprimformoj, novaj nuancoj, novaj asociacioj. Originalaj poetoj kantas, kaj iliaj versoj stampas vortojn per neeviteble aperantaj rememoroj. Komunaj klopodoj kaj ekfloranta literaturo, jen la du rimedoj, per kiuj la lingvo akiras egalrajtecon al la vivantaj lingvoj kaj tratabante la ŝiman ĉambron de la nepra seka logikeco, turnas sin al la suno de l' Vivo por kreski, flori kaj frukti!

Du specoj de stilo ŝajnas maleblaj en Esperanto: la lingvaĵo arkaika kaj la lingvaĵo popola.

Sed ankaŭ tiuj ĉi malebloj ne estas nepraj.

Esperanto evoluas. Vortoj, stilmanieroj elmodiĝas. Tio ĉi okazas malrapide, sed certe. Legante verkojn el la unua epoko de Esperanto, ekzemple la unuan lernolibron aŭ la *Krestomation*, oni trovas tie formojn ne plu uzatajn en la moderna Esperanto. *Elrigardi anstataŭ aspekti, dome anst. hejme,*

laboremeco anst. *laboremo*, *tian* anst. *tiam*, *kiel se* anst. *kvazaŭ*, *rifuziĝi* anst. *rezigni* ktp. — jen formoj, kiuj povus *jam nun* vekii impreson de arkaikeco, *se...* — Sed pri ĉi tio poste.

Ankaŭ la lingvaĵo popola ne estas tute malebla. Pri ĝi jam okazis kelkaj provoj kaj ne tute malsukcesaj. Verbotempo nuntempa anstataŭ estinttempa en rakontado, ofta uzo de *ke* kaj *kaj*, inversoj de vortordo *iras mi*, *vidas li* ktp. povas doni al la stilo ian popolan aromon. Krome uzo de ne plene konvenaj vortoj, *draŝi* anst. *bati*, *oreli* anst. *aŭskulti*, *piedi* anst. *iri*, *heni* anst. *ridegi*, *plenbuŝi* anst. *avide manĝi* ktp. La «Proverbaro» de Zamenhof donas ĉi rilate jam belan materialon. Sed certe tre bonvena estus kolekto de tiaj esprimoj, kunmetita de internacia kunlaborantaro.

Vi vidas ke la Esperanta stilo havas riĉajn perspektivojn. Nun ĝi estas ankoraŭ en ĝerma stato, sed per la mirinda strukturo de la lingvo kaj per la fakto, ke ĝia evoluo okazas tute laŭ la maniero de la vivantaj lingvoj, ĝia kresko kaj riĉa branĉornamo nepre devas veni. Pli aŭ malpli frue certe ankaŭ niaj lingvaj institucioj venkos la malhelpojn, kiuj nun malebligas la pli intensan laboron, kaj esprimvortaroj, proverbaroj, kritikaj lingvaj studoj pri famaj Esperantaj verkoj ebligos, ke ĉio jam farita kaj trovita ne estu enterigita en disaj, ampleksaj volumoj, sed estu facile alirebla al ĉiuj. Kaj nur tiam oni surprize rekonos, kian riĉan trezoron de esprimformoj kaj nuancoj posedas Esperanto jam ankaŭ nun.

Sed al la dezirata evoluo de la Esperanta stilo oni bezonas ankoraŭ ion, kio estas la plej grava afero laŭ mia opinio. Ĝi estas la *unueco de la stilo*. Tre grave estas emfaze akcenti ĉi tion, ĉar multaj eminentaj Esperantistoj ne rekonis ankoraŭ sufiĉe ĝian esencan gravecon. Ofte mi legis el bonaj plumoj, ke traduko el iu nacia lingvo konservu specialaĵojn de la respektiva lingvo, ke iu traduko estas ĉarma, ĉar ĝi montras al ni interesajn idiotismojn nacilingvaj. Ĉi tiuj opinioj estas ne nur eraraj, sed ankaŭ danĝeraj por la Esperanta stilo. Esperanto havas sian propran spiriton, ĉiu deflankiĝo de ĉi tiu spirito estas simple eraro, same kondamninda, kiel fremdaj naciismoj en iu nacia lingvo. La rumana lingvo, ekzemple, ne havas partipojn, ĉu tradukante el ĝi ni esprimu ĉiun partipon per aparta frazo? Per ĉi tio ni tute ne akiras la saman efekton, ĉar tia frazkonstruo en la originalo estas tute *natura*, dum en Esperanto ĝi estas *nekutima*, *peza*. Kie do estas la limo de ĉi tiu permeso pri la naciaj apartaĵoj?

Pripensu, ni volas havi stilefektejn! Por tio ĉi ni bezonas simplan, ĝeneralan stilon, *kanvason*, *sur kiu oni povas brodi*. Tia stilo jam ekzistas, estas trovebla en la verkoj de la plej bonaj Esperantaj stilistoj: *Zamenhof*, *Kabe*, *Grabowski*, ktp. Ili havas propran spiriton, kaj ĉi tiu spirito de la lingvo malfermiĝas por ĉiu, kiu zorge okupiĝas pri bonaj verkoj. Kun iom da sperto oni bone povas konstati, kiom diferencas ĉi tiu spirito de la spirito de lia nacia lingvo, kaj tiam oni estos vere ĝenata, rimarkante, ke en iun lingvaĵon enŝtelis sin fremdlingva spirito. Kiu ne havas ankoraŭ la certan senton pri Esperanto, tiu ekzercu sin per simplaj tekstoj, partoprenu

superajn kursojn, legu kaj legu kaj legu, sed literaturajn ĉefverkojn li lasu en trankvilo. Ĉar nek la originalo, nek nia lingvo dankos al li lian penon.

Do ekzistas propra spirito, ĝenerala, ĉiufaga stilo. Ĉiu, kiu aspiras verkistajn laŭrojn, devas nepre disponi pri ĉi tiu stilo. Ĉiu, kiu volas vere ĝui Esperantan literaturon, devas rimarki ĉiun deflankiĝon de ĉi tiu stilo. Ĉar, se okazas tia deflankiĝo, ĝi devas *signifi ion!* Ne tion, ke la tradukinto estas anglo aŭ japano, nek tion ke li estas komencanto, aŭ eterna komencanto, sed ian nuancon, kiun *ano de ĉiu ajn nacio* esprimus Esperante per la sama stilpartaĵo. Nur tiamaniere ni povas atingi, ke ian *intencan* nektutiman esprimformon la leganto ne rigardu kiel nacilingvan idiotismon aŭ lingvan kapricon de la *tradukinto*, sed li eksentu ĝin kiel arkaikan aŭ popolan aronon, aŭ kiel stilpartaĵon de la *aŭtoro*.

Tia ĝenerala stilo ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj nur havante ĝin povas Esperanto kun ili konkuri en la kampo de l' stilo, t.e. en la literaturo kaj poezio.

Kompreneble ĉi tio ne signifas ke la naciaj lingvoj, el kiuj devenas kaj riĉiĝas Esperanto, ne povas ĝin efiki, evoluigi per novaj esprimformoj. Sed ĉiu tia nova esprimo estas bona nur, se ĝi povas kaj devas fariĝi ĝenerala, do ĝi konformas al la internacia pensmaniero, al la spirito de Esperanto kaj donas solvon por mankanta esprimo de nuanco. Esperanto estas vivanta korpo, do same kiel la homa organismo, ĝi ne povas toleri en si fremdan elementon, ĝi ĝenas, dolorigas, malsanigas ĝin. La eksterajn efikojn ĝi devas dismeti kaj sintezi, konformigi al si, kiel la homa korpo asimilas la nutraĵon; nur tiel ili fariĝos vere vivantaj partoj de la lingvo.

Tiamaniere mi imagas la konstantan fekundigon de la lingva spirito, la senĉesan evoluon de nia lingvo, per la *tradukoj*. Sed apud tiuj trezoroj, kiujn la lingvo ricevas tiel kvazaŭ prunte, ni ne devas ignori tiujn riĉaĵojn, kiujn ĝi akiras senpere el la koroj de siaj entuziasmuloj, per la verkoj *originalaj*.

Oni aŭdis jam opiniuojn, kiuj kondannas la originalan verkadon en Esperanto kaj koncedas nur tradukojn. Sed estas evidente ke tia malpermeso estas absurda. Estas ja ne eble ke iu, kiu multe uzis Esperanton por interprete fremdajn sentojn kaj rekonis en ĝi ĉiel taŭgan, mirinde flekseblan, perfekte kapablan instrumenton de esprimo, ne uzu ĝin, se li havas poezian kapablon kaj inspiron, ankaŭ por la interpreto de siaj sentoj propraj. Estas vere, ke Esperanto estas nenies gepatra lingvo. Sed oni ja vidis jam ekzemplojn pri poeziaj ekskursoj en fremdan nacian lingvon kaj okazis eĉ, ke tia ekskurso produktis majstroverkon. Ĉu tio, kio okazis en tute fremda lingvo, ne povus okazi en la lingvo *gefrata*?

Kaj, se la aŭtoro vere havas ion por diri, se li povas lumigi neesploritajn profundojn de la homa animo, se li havas la misteran donacon: esprimi klare ĝis tiam neesprimitan kaj neesprimeblan — lia originala verkado estos pli fruktodona por la lingvo eĉ ol la plej perfekta traduko. Ĉar tie ĉi inter la inspiroj, kiuj tuŝis lian koron, havos parton ankaŭ la lingvo mem,

ĝiaj eblaĵoj ekfloros spontanee, sento kaj esprimo, penso kaj manifestiĝo, ideo kaj formo fandiĝos en tian harmonion, kian povas doni nur la senpera enkorpiĝo de la poezia iuspiro. Kaj se iam genian spiriton inspiros nia lingvo por admirata majstroverko, tio estos por Esperanto la triumfo de triumfoj, tiam nia reĝino Poezio neniam plu devos forlasi sian tronon, regante la korojn per la beno de Ĉarmo, Sento kaj Ideo.

Kaj tial mi, fidela batalanto de nia kara tronpretendantino, varmege salutas kaj adiaŭas vin en ĉi tiu belega festo de nia bona kaj rajta konspiro. La Ĉarmo de nia reĝino, la sento de entuziasmo, la ideo de nia Afero ravas vin en tiu ĉi momento. Konservu tiun ĉi magian varmon ĉirkaŭ via koro kaj, per vorto kaj ago kiel ĝis nun, disdonu donace el ĝi ĉien kien atingas la radioj de la verda stelo. Ĉar varmajn korojn bezonas nia poezio por vivi, korojn kiuj ŝin amas, kiuj por ŝi oferas. Kaj per koroj, per viaj koroj ŝi venkos. Kaj tiam la Clio de nia poezio donos al la bela Katalunujo la nevelkeman Naturan Floron.

Kolomano de KALOCSAY

La tre interesan kaj valoran verkon de la Prezidanto la ĉeestantaro longe aplaŭdas, kaj post tio al la diversaj grupaj standardoj, kiuj ornamas la scenejon, la Reĝino donas belan rubandon el silko sur kiu estas broditaj la blazono de la kongresurbo kaj aludo pri la kongreso.

La orkestro ekludas nian himnon kaj la Reĝino kaj la kortego de Amo forlasas la teatron dum la publiko stariĝas kaj aplaŭdas la belan Feston, kiun oni longe rememoros.

Oficiala festeno

Post la solenaj Floraj Ludoj, la Prezidanto de la loka Komitato de la Kongreso regalis la kongresanojn kaj aŭtoritatulojn per riĉa Festeno, kunfratiĝa festo de niaj Kongresoj. En la Granda Hotelo de Palma, en salonego bele pretigita, ĉe tabloj malavare ornamitaj per riveroj da floroj, kunsidis pli ol ducent personoj sub prezido de la Reĝino de la Floraj Ludoj kaj korteganinoj kaj inter ili estis la urbaj kaj kongresaj aŭtoritatuloj. Anstataŭ la havanaj cigaroj, al viroj disdonitaj, luksajn kaj plenajn bonbonujojn al virinoj oni donacis. Satiga, fratiĝa, ĝojiga, gajiga, dankemiga al la nesuperebla organizinto de la Kongreso, estis tiu neforgesebla Festeno.

Kiam alvenis la ĉampanmomento, kvazaŭ antaŭkonsentite, ĉesis bruo, sonoro kaj zumo de manĝiloj kaj babiloj, fariĝis silento profunde emociiga, kaj nia kara venkinto Narciso Bofill dediĉis la Festenon al ĉiuj kongresanoj kaj aŭtoritatuloj, kaj diris klarigojn pri nia movado kaj celo laŭde kaj fervorige por Esperanto kaj la Kataluna Esperantista Federacio. Aplauĝo de ĉiuj festenanoj montris ĉies simpatian kaj dankemon al la glora organizinto de nia Kongreso en Palma.

La bela Reĝino legis ĝentilan saluton.

La urbkonsilanto S-ro Fiol en reprezento de la urbestro diris elokventan saluton al la kongresanoj, kaj esprimis simpatian al nia movado kaj idealo.

La Prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio diris en Esperanto ke li salutos plurlingve por ke la nekompreno pro diverseco de lingvoj vidiĝu la neceson de Esperanto, komuna lingvo. En kataluna lingvo, gepatra natura lingvo, komuna de katalunoj, balearanoj, valencianoj, andoranoj kaj rusiĵonanoj, tial de la Reĝino kaj de la Organizinto de la Kongreso, kiuj estas el Mallorca, paroladis laŭde al la beleco de la unua kaj al la heroeco de la dua. Poste en hispana, angla kaj germana lingvoj salutis la respektivajn ĉeestantojn el tiuj lingvoj, kaj bedaŭris, reparolante Esperanton, ke li ne povis en ilia natura lingvo ankaŭ saluti S-inon Hrbáčková kaj S-ron Fikrle alvenintaj el Zlin kaj Bratislava. Daŭre en Esperanto li diris al samideano Josep Berger, sekretario de la Iberia Kongreso okazinta en Kordovo, ke li rimarku, ke individuo, kiu veturis al tiu malproksima andaluza urbo, por diri post la esperanta saluto de nia reprezentanto en la Iberia Kongreso, ke li deziris saluti en la nomo de la «veremaj» kaj «verecaj» katalunoj, kaj tion faris per paroloj nek katalunaj nek esperantaj, ne ĉeestas la Kongreson de la katalunlingvanoj. Tial la prezidanto atentigas S-ron Berger kaj la hispanlingvajn samideanojn ke ili atentu la faktojn, kiuj estas veraj pruvoj. La hispanlingvaj samideanoj ne estu trompeblaj je malplenaj, kiel ajn flataj vortoj.

Katalunlingveco inter samlingvanoj kaj esperantisteco inter diverslingvanoj estas *fakta* pruvo de veremo, sincero kaj vereco de esperantistaj katalunlingvanoj, kiuj tiel estas profunde esperantistaj ĉar ili akceptas nek trudon al si nek al aliaj de nesia nacia lingvo, ĉar ili akceptas nur Esperanton kiel komunan helpan lingvon.

En la nomo de la lernantoj de esperantaj kursoj gvidataj de S-ro Bofill en Palma, S-ro Nadal liveras al li donacon kiel pruvon de estimo kaj dankemo de ĉiuj kursanoj.

La Ĝenerala Sekretario de la Centra Komitato, S-ro Robert Kreuz, sendito de U. E. A. diris la jenan toston:

Reĝina moŝto,

Honorindaj civitanoj de Palma de Mallorka,

Karaj geamikoj katalunaj kaj eksterlandaj,

Emociite mi staras en via rondo sub la impresoj de la Floraj Ludoj. Kortuŝite mi ĉeestas tiun ĉi grandiozan manifestadon en tiu ĉi pentrinda salono. Ĉirkaŭ mi, mi vidas la ondojn de l' entuziasmo de l' senlaca fidelularo.

Se mi reflektas la okazintaĵojn de la lastaj 3 tagoj, dum kiuj estis en via amika rondo, mi havas la grandan honoron, mi ree venas al la konkludo, jam kelkfoje de mi aludita en miaj diversaj alparoloj, ke regas vin kaj nin ĉiujn unu granda idealo, unu granda komuna penso, la interna ideo de l'Esperantismo. Dank' al ĝi estas kaj kreskas nia afero.

Volu do vi, ho karestiminda Reĝino de l' Floraj Ludoj, simbolo de l' beleco kaj majesto, animi nin por nia granda celado; volu vi, ho floroj katalunaj de l' Floraj Ludoj emblemo de pureco kaj amikeco, fortigi nin por nia granda tasko, konservadi en ni tiun valoran ideon internan de l' komuna sento, kiu gvidas nin ĉiujn kaj helpas al la grandegaj sukcesoj de Esperanto. Helpu al tio, ke baldaŭ la tuta homaro komprenu la necesecon de help-lingvo internacia, alproksimigilo paca inter la popoloj kaj la grandecon de tiu tasko, por ke baldaŭ kaj fine efektiviĝu nia granda homama celo. Jen la profunda deziro de mia tosto, je kies realigo mi levas mian glason.

Nia angla samideanino Emma L. Osmond, kiu plurfoje konkursis en la Internaciaj Floraj Ludoj kaj meritis premiojn, en la nuna jaro venis persone ricevi ilin, kaj faris ankaŭ salutan paroladon en la nomo de siaj samlandanoj.

S-ro. Josep Berger, salutis, kaj, responde al la Prezidanto de K. E. F., promesis klarigi al la hispanlingvaj samideanoj la *faktojn*, kaj aldonis ke li esperas de la nova organizo Hispana Esperanto—Asocio, ke nia Movado en la duoninsulo definitive envojiĝos por efika progreso harmonie de ĉiuj.

S-ro. Marian Solà, Sekretario de K. E. F. diris finan saluton kaj rimarkigis la duoblan komunecon inter balearaj kaj katalunaj esperantistoj, kiu nin double kunfratigis: komuna gepatra lingvo kaj samideaneeco.

Ĉiuj paroladoj estas varme aplaŭditaj.

Muzikaj Festoj

Postfestene, bonega orkestro ĉe «Teatro Lírico» ludis plenan kaj belan simfonian koncerton en kies programo rimarkigis Mallorka kaj Kataluna rapsodoj. Okaze de tiu festo multaj gekongresanoj renkontiĝis en tiu Teatro, kaj ĝoje interparolis la sukceson de nia Kongreso, kiu montriĝis pli granda ol espereble, en la soleno kaj poezieco de la Floraj Ludoj, kaj en kunfratiĝo kaj anineco ĉe la Festeno, ĵus okazintaj.

Postvespermanĝe, ĉe la «Teatre Principal» okazis kantaŭdaĵo de l' «Orfeó Mallorquí». Ĉiuj gekongresanoj kaj amaso da Palmaj loĝantoj tute pleniĝis la grandan teatron. Post la aŭdaĵo ni bone komprenis kial tiom da personoj ĉeestis. La kialo estas ke tiu «Orfeó», samskola je la fama «Orfeó Català» en Barcelona, bele, bonege kantas la balearajn kaj katalunajn kantojn.

Jen la interesa programo majstre aŭdigita de l' «Orfeó Mallorquí»:

I

Himne Esperantista,	vortoj de Zamenhof	Muziko de F. de Menil
Himne de l' Orfeó,	» de E. Oliver	» de A. Gelabert
L'Hereu Riera,	» Cançó Popular	» de Cumellas Ribó
El Remers del Volga,	»	Cançó russa
Sant Josep i Sant Joan,	Cançó Popular	» de A. Pérez Moya

II

Les fulles seques	vortoj de A. Guimerà	Muziko de E. Morera
La Nina i el Moliner	Cançó popular	> A. Pérez Moya
Jovenívola,	> de Ll. Millet,	> Ll. Millet
Vou-veri-vou	> de M. Binimelis	> B. Binimelis
Reculliment	> de M. Costa Llobera	> J. Canyelles

III

Fill d'ànima	vortoj de J. Alcover	Muziko de A. Noguera
Cant dels ocells	Cançó popular	> Ll. Millet
Cançoneta	< N. Riera	> A. Coll
La lluna la bruna	Cançó popular	> M. Binimelis
Himne Esperantiste	> Zamenhof	> F. de Mènil

En ambaŭ muzikaj festoj varmaj aplaŭdoj montris la ŝaton de la aŭdantoj al la ludintoj, kaj la fervoron, kiun sentigas al la esperantistoj la aŭdo de nia himno «La Espero», kiu estas bonege aŭdigita orkestre en la unua koncerto kaj ĥore en la dua.

Kelkaj el la muzikaĵoj tiel entuziasmigis la publikon ke la aplaŭdoj ne ĉesis ĝis dua aŭdigo.

Tiuj du festoj denove pruvis la bonan elekton kaj organizon de la kongresa festaro. Sincere ni gratulas la organizintojn kaj la ludintojn.

Dimanĉo 24

La kongresanoj akurate plenumis la programon difinitan por tiu ĉi tago kaj rompante la kutiman malfruemon, ĉe tagiĝo diversaj aŭtomobiloj forkondukis ilin tra la plej belaj lokoj en la insulo. Valldemossa, Sòller, Pollensa, Andraitx kaj ceteraj mallorkaj naturbelaĵoj altiris multajn kongresanojn, kiuj kun larĝe malfermitaj okuloj dum la tuta tago rigardadis kaj laŭdatis la nesupereblan belecon de tiu kvieta insulo, en kiu iel nekompreneble amasiĝis unu apud alia perlo kaj safiro, diamanto kaj rubeno, topazo kaj brilianto, k. t. p., tiel ke la tuta lando estas juvelujo, kies enhavataj valoraj ŝtonoj estas la plej granda trezoro en la mondo.

Se vi, kara leganto, neniam vidis ĉe tagiĝo la silueton de la mallorkaj montoj, kiam via ŝipo alproksimiĝas al la palma haveno, ne atendu morgaŭ por fari la ekskurson. Se viaj okuloj por eterne fermiĝos ne turninte rigardon al la orita insulo, dum la tuta eterna dormo vi bedaŭros la forgeson kaj ne dormos trankvile.

La raportanto ne aliĝis al la aŭtomobilaj karavanoj kaj restis en la urbo. Je la 9-a matene en la sidejo de Esperantista Klubo Palma renkontiĝis trideko da gesamideanoj kun la celo promeni tra la urbo kaj viziti la diversajn monumentojn, kiujn ĝi enhavas.

Mi ne kuraĝas priskribi kiom da belo antaŭ niaj okuloj desegniĝis tiun tagon. Nur tiu, kiu povis konstati propraokule la belecon de antikvaj kortoj en multaj palmaj domoj, povas kredi ke en unu sola urbo povas amasiĝi tiom multaj vidindaĵoj. La Katedralo, Reĝa Palaco, Mara Konsulejo, Araba Banejo, Episkopa Palaco, k. t. p., pri kiuj la kongreslibro donas diversajn detalojn, naskis en ĉiu vizitanto neforgeseblan impreson.

Posttagmeze oni faris promenadon tra la ĉirkaŭaĵoj de la urbo kaj ĉie la sama impona beleco kaj la sento, ke neniam antaŭe oni ĝuis tiajn panoramojn.

S-ro. Bofill kaj Rosselló klarigis en ĉiu okazo pri la epoko de la monumentoj kaj pri la stilo de la diversaj antikvaĵoj.

Lundo 25

Ĉirkaŭ 70 kongresanoj partoprenis la ekskurson al Manacor kaj kavernoj «Del Drac». Vagonaro kondukis la ekskursantojn ĝis Manacor kaj de tie per tri aŭtobusoj oni veturis ĝis Porto Cristo.

La tuta vojaĝo estas rimarkinda, precipe la muelejoj en la ĉirkaŭaĵoj de Manacor altiras la atenton de la vojaĝanto kaj rememorigas al li batalon de Don Kihoto kontraŭ la flugiloj de ventmuelilo. Super la tegmento de la tu-roformaj muelejoj malrapide turniĝas la flugiloj, kiuj donas reliefan belecon al la pejzaĝo.

La haveno de Porto Cristo havas tiajn mirindajn kolorojn, ke oni demandas al si ĉu efektive tio estas verko de la naturo aŭ ia fabela paĝo. Sed ĉio restas pala, ĉio submetiĝas, kiam vi eniras la faŭkon de Kaverno del Drac kaj sub la tero vi troviĝas en grandega ekstazo rigardante kiom povis ellabori la konstanta falado de guto. Neniu sukcesus priskribi la ĉarmon de tiu subtera labirinto. Neniu povus prezenti al si en fantazio kiom impresas lago Martel, kies purega travidebla akvo vidigas la misteran fundon de la lago.

Post la tagmanĝo S-ro. Bofill regalis la ĉeestantojn per improvizita prezentado de la regiona danco «Bolero», kiun dancis diversaj vilaĝaj paroj. Multe oni aplaŭdis la organizinton kaj la bonajn dancintojn.

Ĉe la fino de la festo al ĉiu partoprenanto oni donacis ekzempleron de la verko «Homaranismo», eldono de S-ro. Julio Mangada, kiu ŝajne estas la sola homo, kiu ne legis tiel altan verkon.

La omnibusoj kaj vagonaro rekondukis nin al Palma kaj momenton post la alveno al la kongresurbo, aŭtomobiloj rapidis al la haveno. Ĝustatempe ni atingis la ŝipon kaj jen alvenis la bedaŭrinda

Adiaŭo

Manpremoj, bondeziroj, reciproka dankado...

Sur la kajo staras multaj palmaj geesperantistoj; antaŭ ili nia bravega

Bofill, la homo, la frato, kiu sian vivon estus doninta por sukcesigi nian XII.

Sur la ferdeko grupiĝas ĉiuj kaj potenca ESPERO sonas tra la aero.

Iom post iom nevidebliĝas nia amata Reĝino, nia elokventa Rosselló, nia neforgesebla Bofill, kies lasta aŭdebla adiaŭo estas; vivu K. E. F.

Nia ŝipo estas jam malproksime de Palma kaj nia penso estas ankoraŭ kun la ĵusadiaŭitoj. Mallorca, bela inter la plej belaj insuloj, vi havas trezorojn aliloke ne troveblajn, sed super tiuj grandegaj trezoroj staras ne atingeble pli alte nia Bofill, la vera kaj obstina defendanto de la Zamenhofaj doktrinoj.

La vojaĝo ne estis tiel ĉarma kaj trankvila ĉe la reveno. La planko balanciĝis sufiĉe multe por ni, maristoj de dolĉa akvo, kaj baldaŭ sur la ferdeko restis nur kuraĝuloj kaj tiuj, kiuj ne povis havigi por si kajuton.

Pluva tago atendis nin en Barcelona. Rapida adiaŭado kaj ĝenerala saluto: ĝis la XIII-a.



Pri la «Kataluna Antologio»

En nia lasta numero ni sciigis pri la projekto krei 25-pesetajn akciojn por atingi la kapitalon necesan por eldoni la «Katalunan Antologion». Hodiaŭ ni ĝojas komuniki al niaj legantoj ke estas jam subskribita la necesa nombro de akcioj. Iliaj posedantoj kunvenis la 7^{an} de Junio kaj elektis la jenan Administran Komitaton: Prezidanto: S-ro. Artur Domènech; Sekretario: S-ro. S. Alberich Jofré; Kasisto: S-ro. Eduard Capdevila; Teknika Direktoro: S-ro. Jaume Grau Casas, compilinto de la «Antologio».

Do la presado de tiu grava verko baldaŭ komenciĝos. La tuta eldono (500 ekzempleroj) estos «bibliofila», ĉar ĝi estos zorge presata sur bona kaj altkvalita papero Guarro. La konata fabrikisto pruvis sian simpatian al Esperanto, farante gravan rabaton en la prezo de la aĉetita papero.

De kelkaj katalunaj literaturistoj jam estas ricevita la permeso por reprodukto de iliaj verkoj. Ni devas menciigi kun danko ke unu el ili, la eminenta kaj tre delikata poeto Joan Arús, el Sabadell, ne nur donis sian permeson kaj kuraĝigis la entreprenon, sed ankaŭ aperigis artikolon pri ĝi, tre favoran al Esperanto, sur la kataluna ĵurnalo «La Veu de Sabadell» (2 Junio 1925). Kelkaj paragrafoj de tiu artikolo ŝajnas verkitaj de malnova samideano.

Petante permeson al la katalunaj aŭtoroj por eldoni la esperantajn tradukojn, ni profitas la okazon por fari efikan propagandon. Ni informos pri ĝiaj rezultatoj.

Fine, sed ne laste, ni esprimas koran dankon al la fervora samideano Joan Gili Norta, kies agemo kaj malavareco ebligis la baldaŭnan starigon de la akcia societo kaj plenan sukceson de la kuraĝa entrepreno.

La Konferencoj en Parizo

14-17 Majo 1925^a

(Raporto de nia Rerezentinto)

Al multaj sukcesoj kiujn ni, la tutmonda esperantistaro, ŝuldas al la Francaj samideanoj, ni devas ankoraŭ aldoni du novaĵn kaj gravajn.

Sendube vi, kara leganto, konscios ke se eminentaj sciencistoj el la Mondmetropolo kaj la Pariza Komerca Ĉambro invitis partopreni la Konferencojn por la edukado de Esperanto en iliaj sciencaj kaj komercaj kampoj, estas ja fakto pri kies graveco mi ne devas paroli. Ambaŭ konferencoj estas nova venko por nia idealo kaj ili estas novaj ŝtupoj kiujn ni supreniris por rapide atingi la altajn: la fina venko.

Kiel reprezentanto de *KEF* kaj de nia organo *Kataluna Esperantisto*, mi partoprenis la taskojn de la Parizaj Konferencoj. Bedaŭrinde mi ne povos raporti detale pri la Sciencista Konferenco, ĉar mi estis absolute akaparita de la komercistaj taskoj kie mi min sentis pli inklinita kaj eĉ pli sperta. Alia cirkonstanco kiu malpermesas al mi fari detalan raporton pri la Scienca Konferenco estas ke ĉiam koincidis, kaj ne en sama ejo, la taskoj de ambaŭ kunsidoj, kompreneble mi ne poviĝis ĉeesti ambaŭ.

Pri la Komercistaj taskoj mi detale raportos. Pri la Sciencaj mi nur povas diri kion mi aŭdis: Ĝi bone sukcesis kaj ni baldaŭ povos konstati la atingitajn rezultatojn.

Kurioza fakto, kiun mi volas noti, estas tiu ke laŭ la diro de la partoprenintoj en la sciencaj kunsidoj, tie kie estis eminentaj paroladistoj kaj polemikistoj, oni malmulte parolis nek diskutis. Aliflanke inter la komercistoj kie estis, laŭ la diro de kelkaj, nur praktikaj homoj, oni longe parolis, diskutis, temis, raportis, kaj fine en la ferma kunsido ni estis devigataj rapide aprobi la konkludojn kaj deziresprimojn, horloĝo en mano, rapidegigante ĉiujn habilemulojn kaj restis kelkaj malkontentaj kaj ne pleneĉerpitaj en siaj terure facigaj diskutoj.

Faritaj tiuj ĉi, mi nomu ilin «enkondukajn vortojn» kaj sciante ke mi ne povas tro longe raporti pro la cirkonstanco ke la nuna numero de *KE* devas enhavi aliajn raportojn, mi klopodos koncize doni la ĉefajn detalojn pri tio kion mi vidis kaj travivis:

ĴAŬDO 15

Malfermo de la Komerca Konferenco ĉe la Komerca Ĉambro.

Tie, ĉe la belega domo kie sidas la Pariza Komerca Ĉambro, antaŭ la komenco de la kunsido mi salutis multajn konatulojn, mi denove vidis la vizaĝojn kaj premis la manojn de fervoruloj ĉiulandaj. Ĉiuj koroj batis samecie, pro ĝuo, pro simpatio, pro amikeco kaj samideaneco al tiuj kiujn fervoro instigis vojaĝi al la Konferencoj. Bonvenintaj estu!

Jen la ĝenerala saluto al ĉiuj.

La kunsidon inaŭguris la Prezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro S-ro. Kemf. Apud li sidis kiel prezidanto de la Kunsido S-ro. Leonard reprezentante la Ministron Chaumet.

Post salutoj de diversaj delegitoj de Ministerioj, Komercaj Ĉambroj kaj Foiroj oni elektis la estraron de la Konferenco kies Prezidanto fariĝis S-ro André Baudet, Trezorestro de la Komerca Ĉambro de Paris.

Oni disdonis al la ĉeestintoj la listojn de la aliĝintaj komercaj ĉambroj, komercaj entreprenoj kaj foiroj, kies ne komplementa cifero (ĉar post la presado de la listo alvenis ankoraŭ novaj aliĝoj) estas 266.

Oficiala malfermo de la Konferencoj ĉe la «Sorbonne»

Vespere de tiu sama tago ĉe la belega amfiteatro de la «Sorbonne» sub la Prezido de S-ro. Charles Richet, la eminenta membro de la Franca Instituto, kaj apude sidantaj multaj sciencistoj, oficialaj delegitoj de Ministerioj k. t. p. oni malfermis la kunsidon.

Paroladis france Sroj. Daniel Berthelot, membro de la Instituto; Pierre Corret vicprezidanto de la Franca Societo de T. S. F.; André Baudet, de la Komerca Ĉambro.

Mi ne povas doni ĝustan opinion pri la plej bona parolado el tiuj tri. Ĉiuj estis elokventegaj kaj ĉiu en sia respektiva rolo parolante pri Esperanto en la Scienco, en la Senfadena Telegrafo kaj Telefono kaj en la Komercio, eldiris tiom da argumentoj kaj donis tiom da pruvoj favore al nia celo ke mi nur povas certigi ke ili bonege impresis la grandamase ĉeestantan publikon, plejparte neesperantistan. Laŭtakse de iuj ĉeestis la kunsidon pli ol 2000 personoj. Post la francaj paroladoj stariĝis kaj esperantlingve paroladis nia eminenta pioniro S-ro. Edmond Privat. Tiuj, kiuj iam havis la plezuron aŭdi la elokventon de tiu nelacigebla Prezidanto de Centra Komitato, povas kompreni ke mi ne troigas dirante ke D-ro. Privat, kiel kutime, elvokis la aplaŭdodon de ĉiuj ĉeestantoj. Li klopodis kaj trovis la sistemon eldiri sian paroladon serĉinte plej oportunajn esprimojn kaj nuancojn por esti facile komprenata de la franca ĉeestantaro; kaj ke li plene atingis sian celon estas la pruvo, ke preskaŭ ĉiuj komprenis ĉion kion li parolis.

Ĉiuj paroladoj estis disaŭdigitaj pere de la Senfadena Telefonio.

Belaj aktokonzertoj en franca kaj esperanta lingvoj agrabligis la finon de la malferma kunsido pri kies sukceso ĉiuj ĉeestintoj konservos plej agrablan rememoron.

VENDREDO 16

Unua Kunsido de la Komerca Konferenco

Ĉe la granda salono de la Pariza Foiro, matene, dum terura balaado kaj meze de polvoplana atmosfero, sub la Prezido de S-ro. Baudet oni komencis la laborojn de la Konferenco.

Paroladis : S-ro Hromada, el Ĉeĥoslovakujo,
 S-ro Kreuz, nome de la Foiroj uzantaj Esperanton,
 S-ro Ellersiek, el Germanujo,
 S-ro Gabriels, el Nederlando,
 S-ro Piñó, nome de la Valenciaj Foiro kaj Komerca Ĉambro.
 S-ro Gili Norta, nome de la Barcelona Foiro kaj K. E. F.
 S-ro Volg, el Stutgart (Germanujo)
 S-ro Grenkam, el Polujo, kaj reprezentanto el Litovujo, kies
 nomon mi ne povis noti.

Oni aprobis deziresprimon petantan al ĉiulandaj esperantistoj la reel-
 donon de la Ĉefeĉaj Ŝlosiloj.

Dua Kunsido de la Komerca Koferenco

Posttagmeze ĉe la sama ejo. Paroladis S-ro Grosjean Maupin. Poste es-
 tis legataj la raportoj pri la internacia instruado de Esperanto inter la ko-
 mercistoj. Mi aŭdis interesajn raportojn de la delegitoj de Anglujo, Ger-
 manujo, Francujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Svisujo kaj Neder-
 lando. Mi ege bedaŭris ke en Katalunujo la eksperimento ne estis farita kaj
 tial mi estis devigata silenti. La raportintoj pri la eksperimento en Berlin
 kaj Antwerpen prezentis al la Kunsido la gajnintojn de la premio (vojaĝo
 al Parizo okaze de la Konferenco) kiuj post kvarmonata lernado pruis es-
 ti kapablaj ne nur komerce korespondadi sed eĉ paroli sufiĉe korekte. La
 lernantoj salutis la Konferencon; ili estas : S-ro Otto Scheurmann el Berlin
 kaj F-ino Rosa Spira al Antwerpen.

Supozata estos la fakto ke oni aplaŭde dankis la raportintojn, la lernan-
 tojn kaj ĉiujn kiuj parolis kaj laŭdis la laborojn de la komitatoj en la di-
 versaj landoj.

Akcepto de la Konferencanoj ĉe la ĵurnalo «Les Échos»

Post la posttagmeza laborkunsido ĉiuj konferencanoj estis petataj vi-
 ziti la komercan ĵurnalon «Les Échos».

Tie paroladis France la ĉefdirektoro de la ĵurnalo kaj poste per bonega
 parolado nialingve dankis kaj proponis, nome de la redaktoroj de la ĵurnalo,
 ĉampanglason D-ro Paul Fructier.

Kelkaj ĉeestintoj dankis la favoran akcepton kaj helpon de «Les Échos».
 Inter aliaj paroladis S-ro Kenn, la simpatia ĉina samideano konata de mul-
 taj katalunaj esperantistoj, kiu per siaj tipaj kaj moviĝantaj mienoj tre bone
 kaj sprite dankis la apogon de la ĵurnalredaktoroj al nia movado.

Festo de la Pariza Grupo kun partopreno de la «Verda Kato»

Ĉe la granda salono de la ĵurnalo «Le Petit Journal» la parizaj espe-
 rantistoj regalis la partoprenintojn de la Konferencoj per esperanta festo.

Oni ludis tute korekte la teatraĵon «Angla Lingvo sen Profesoro».

Oni ludis belegajn muzikpecojn kaj F-ino Marga Rineta gracie kantis kelkajn parizajn kanzonojn esperanten tradukitajn. Ŝi rikoltis grandajn aplaŭdojn kaj denove mi profitas la okazon sendi al ŝi miajn plej sincerajn.

Entute belega noktofesto pri kiu ĉiuj ĉeestintoj gardos plej agrablan rememoron.

SABATO 17

Ferma Kunsido de la Komerca Konferenco

D-ro Cart prezentis provizoran liston de komercaj vortoj kiu estis disdonita al la ĉeestantoj, petante ke oni sendu al li la rimarkojn kiuj laŭ la opinioj de la diverslandaj ĉeestantoj estas aprobeblaj. Poste oni oficialigos la vortojn de Lingvo Komitato.

Oni aprobis kelkajn rezoluciojn kiujn oni legos en la Oficiala Protokolo aperanta en «Esperanto», kiujn mi ne povas detale priskribi pro manko de loko.

Kunsido de Centra Komitato kaj Konstanta Re prezentantaro.

Ĉe la Oceanografia Instituto kunsidis C. K. kaj K. R. Pri tiu ĉi kunsido mi malmulte parolos. Ĝi estis la unua en kiu mi partoprenis kaj mi ne eliris tiun bonegan impreson kiun mi ja deziris. Mi spertis troan influon kaj superregadon de U. E. A. Espereble en venontaj kunsidoj oni aranĝos la aferon tiamaniere ke K. R. estu pli libera, plej memstara, laŭ deziroj esprimitaj de la franca kaj belga reprezentantoj al kiuj mi donis mian tutkoran apogon. Ili ja vidis ke mi ĉiam voĉdonis kun ili.

Dum la kunsido oni komplimentis S-ron Generalon Sébert, donacante al li arĝentan sukerujon, havigitan per monokolekto de ĉiuj ĉeestantaj naciaj societoj. S-ro Privat paroladis proponante la donacon kaj dankante lin nome de la tutmonda samideanaro, pro la laboroj faritaj de Generalo Sébert.

Generalo Sébert emocie dankis la ĉeestantaron. Poste Profesoro Richet kiu ankaŭ partoprenis la intiman (eble tro intima laŭ mia percepto) festeton, nome de la sciencistaro franca ankaŭ dankis la meritplenan laboranton kaj per varma kiso sigelis la sindonemecon de Generalo Sébert.

Verkante tiun ĉi raporton venas en mian cerbon ideo kiun mi havis dum mia ĉeesto al tiu rapide aranĝita danko kunsido: Ĉu oni elektis sukerujon kiel simbolon por «dolĉigi» iomete la malagrablajn kaŭzajn al Generalo Sébert de la ĉiamaj malamikoj de Centra Oficejo en Paris?

La taskoj faritaj de Generalo Sébert restos ĉiam en la memoro de la antaŭmilitaj esperantistoj, kiuj bone konas la laboron kaj ŝuldon de la esperantistaro al tiu eminenta pioniro kiu kredeble pro troa elspozemo kaj sindonemeco ricevis tiom da atakoj, tiom da malagrablajoj.

Generalo Sébert meritis, laŭ mia opinio, pli grandan, pli aman demonstracion ol tiu kiun ni kvazaŭ kaŝite kaj timeme faris.

Oficiala Festeno

Ĉe la Restoracio de la Pariza Foiro oni festis per granda bankedo la lastan oficialan kunvenon. En ĝi regis plej amika kaj gaja kunestado. Ĉe la toastoj paroladis diversaj reprezentantoj kaj fine tion faris la Ministeria Reprezentanto S-ro Léonard, kiu esperantlingve informis ke la Ministerio ĵus alprenis la decidon «Rekoni Esperanton kiel klaran lingvon por internaj telegrafaj rilatoj». Kompreneble tiu sciigo estis tondre aplaŭdata kaj meritigis laŭdojn de ĉiuj.

DIMANĈO 18

Vizito al la Ekspozicio de la Dekorativaj Artoj

Interesa parto de la programo estis la vizito al la ankoraŭ ne finita Ekspozicio de Dekorativaj Artoj. Ni estis oficiale invititaj kaj la eniro kostis neniom al ni. Se la Ekspozicio estas ja vizitinda kaj belega, por ni ĝi havis specialan intereson ĉar ni estis lerte gvidataj de unu el la arkitektoj kiuj ĝin direktis. Li estas S-ro Agache, malnova samideano kiu laŭ sia diro de antaŭ pli ol dek jaroj eĉ unu vorton ne estis dirinta en nia lingvo, kaj malgraŭ tio mi povas ja certigi ke li efektive malmulte forgesis.

Kiel mi jam notis la Ekspozicio estis nur duone preta, kaj nur kelkaj domoj estis plene aranĝitaj. Post du aŭ tri monatoj mi ne dubas ke ĉio estos jam finita kaj tiam, mi certigas ke tiuj kiuj povos ĝin viziti, certe eliros tre bonan impreson.

La varmo dum la vizito estis vere «tropika». Tial mi ne forgesas ke danke al la invito de la gvidantoj ni ricevis freŝan trinkaĵon kiu estis kore akceptata.

Lasta vorto

Jen do, karaj legantoj, kelkaj impresoj pri mia ĉeesto ĉe la Konferencoj en Parizo. Mi denove danku la samideanojn de la mondmetropolo pro la laboroj de ili faritaj. Estu certaj ke se interne ni ne faris multan laboron ni propagandis, ni atingis ke nia afero estu legata sur la parizaj ĵurnaloj, ke multaj personoj sin okupis pri ni. Krom tio mi ne dubas ke internacia kunveno ĉiam estas, por tiuj kiuj ĝin partoprenas, nova injekto de entuziasmo, nova pruvo pri la internacieco de nia lingvo.

JOAN GILI NORTA

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

III^a Iberia Kongreso Esperantista

Kordovo, 10-12^a de Majo 1925

Ĉi tiu raporto pretendas esti nenio alia ol tre konciza resumo de l' supre nomita kongreso. La organiza komitato estas eldononta poste pli detalan protokolon. Statistikoj de aliĝintoj: 107 (inter ili 5 eksterlandanoj); de ĉeestintoj: 46 = 43 % (1 belgino, 2 ĉeĥoslovakoj, 1 franco, 1 anglo)

Sabato 9.^a de Majo: Posttagmeze dum pluvema vetero, promeno de la jam alvenintoj tra la urbo; vespere alveno de la seviljana karavano; poste gaja kunesto.

Dimanĉo 10.^a de Majo: Je la 11^a h. okazis la solena malfermo en la ĉefsalono de l' urbestrejo; ĉeestis la civila guberniestro, kiu prezidis; la urbestro, la ĉefo de la Akademio de Belaj Sciencoj kaj Noblaj Artoj, kaj aliaj aŭtoritatuloj. Oficialaj reprezentantoj de Belgio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio-Germanio, K. E. F. kaj diversaj hispanaj grupoj kaj federacioj. La salonon plenis tute la esperantistaro kaj esperantema publiko.

La paroladoj de la aŭtoritatuloj montris grandan komprenemon por nia lingva idealo, kaj la guberniestro promesis sianome proponi la decidojn de l' kongreso al la Registaro.

La solenaĵo postflasis en ĉiuj tre esperigajn impresojn.

Posttagm. Ĉar la vetero aspektis dubeta, oni anstataŭ ol iri kamparen, faris la por lundo projektitan viziton al la Moskeo kaj Muzeo. La misteran ĉarmon kaŭzitan de la nekomparebla arĥitektura monumento kun ĝia vasta kolorarbaro neniu forgesos unufoje vidinte ĝin. Sub lerta gvidado de komisiito oni povis admiri ankaŭ la trezorejon, ordinare nealireblan.

En la Muzeo, la frato de l' fama Romeo de Torres mem montris kaj klarigis al la vizitantoj la artajn valoraĵojn kaj permesis eĉ enrigardon en la laborejon de sia granda frato-pentristo.

Kun koroj saturitaj de belajoj oni revenis al la kongresejo, ampleksa, palacsimila kazino, dumvoje admirante en la tipaj stratetoj la tipajn florplenajn pentrindajn kortojn.

Vespere. Prepara labora kunsido; elekto de l' kongresa estraro. Prez: Fr. Azorin; sekr.: J. Berger kaj F. Serrano.

Lundo, 11.^a de Majo, matene 10^a h. 1^a laborkunsido. Viglega diskutado pri la temo: iberia konfederacio aŭ nacia asocio. En ĝi almenaŭ klarigis tiom la afero, ke oni vespere reveninte de la *ekskurso al la «Bieno de l' Artoj»* povis ĝin daŭrigi kaj per laŭnoma voĉdono decidi, ĉu nia organiza formo restos la «Iberia Konfederacio» aŭ ŝanĝigos en «Hispana Esperanto-Asocio». El 19 rajtigitoj por voĉdoni la formo «iberia» ricevis 1, la formo «hispana» 14 voĉojn; 4 sin detenis. Do, per tio estas aprobita definitive Hispana Es-

peranlo-Asocio (H. E. A.); samtempe oni ankaŭ plene, SED PROVIZORE AKCEPTIS LA DE LA MADRIDA GRUPO proponitan regularon dissendotan por studado al ĉiuj hispanaj federacioj, grupoj ktp. Oni fiksas la kotizon por HEA kun gazeto (La Suno Hispana) je 6. — ptoj. jare, nomis kiel venontjaran kongresurbon Madrido kaj donos al tiu kongreso la numeron 6^a, por fine deklari kongresoj Udkeilon de Barcelono kaj Dudkeilo'n de Zaragozo, kiuj pro la tie farita laboro valora nepre meritas tiun titolon.

Post la vespermanĝo propaganda kunveno en kafejo.

Marto, 12^a de Majo matene, 10 h. 3^a *laborkunsido*. Diskutado pri la alvenintaj proponoj (Suno Hisp. 96, lastpaĝo), kiuj ĉiuj estis aprobitaj. Oni decidis telegrafe saluti la Sciencon kaj Komercon Konferencojn en Parizo kaj fine formulis jenajn rezoluciojn:

Peti al la registaro la laŭgradan enkondukon oficialan de Esperanto en mezajn, porinstruistajn kaj komercajn lernejojn (kun cito de jamaj R. O.).

Peti ke Hispanujo iniciatu en la vivo internacia la oficialigon de Esperanto kunvokante laŭeble interŝtatan konferencon por tiu celo.

Rememorigi al la Registaro la devon realigi la decidon de L. de N. — kies ano estas Hispanujo — ke Esperanto povas esti uzata telegrafe kiel *klara lingvo*.

Esprimante la esperon pri forta progreso sub la nova organiza formo la prezidanto je tagmezo fermis la kongreson.

Poste oni tagmanĝis kune ĉe alesto de la gazetaraj reprezentantoj; sekvis fotografado, kaj la posttagmezon uzis multaj por vagado tra la pentrin-daj anguloj de la urbo.

Merkredo, 13^a de Majo unuigis aliafoje ĉiujn kongresanojn kies nombro tre konsiderinde pligrandigis la tuta sevilja esp-aro, en la ĉarmega fratnurbo Sevilio. Timante ke mi, ĉerpante el la plenego de tre belaj rememoroj, povus troampleksigi ĉi tiun simplan raporton, mi silentas. Unu fakto nur: Ni estis regalitaj per grandioza «lunĉo» en iu el la palacoj por la ekspozicio iber-amerika. Kaj pri unu afero mi estas certega: La postkongreso estis brilbrila fino de la 111^a (kaj lasta) Iberia. Dankon al la nelacigebla seviljano Karolo!

Mi en mia ĉi-supra raporteto ne parolis pri la Kordova Kongreslibro nek pri la granda nombro da alvenintaj salutoj, inter ili multaj telegramoj esperantlingvaj, nek pri la Ekspozicio, kiu — malfanfarone kaj maltroige mi povas ĝin diri — estis granda sukceso kaj mirigaĵo eĉ por esperantistoj bonkonantaj nian vastan literaturon. Mi devis min limigi por sciigi nur la esencon, la kernon. Konvinku miaj malmultaj linioj tamen niajn katalunajn samcelanojn, ke ni volas labori kaj scipovas labori.

K. E. F. ĝojegas ke la hispanlingvaj samideanoj esperantisme sukcesul

Fajreroj

Honore al Poeto Artur Damènech. — La Esperantista Societo Nova Sento, ĉe kiu nia premiita poeto gvidas sinsekvajn sukcesajn kursojn de Esperanto, organizis lunĉon honore al nia kara amiko, por festi lian novan atingon de la Natura Floro okaze de la XI^aj Internaciaj Floraj Ludoj en Palma de Mallorca. La dato por tiu honoraĵo estis la 4 Julio, vespere. — Certe en tiu okazo elokvente montriĝis la simpatio, kiun de tiom da lernintoj kaj samideanoj meritas la fervora kaj klera esperantisto, kies meritoj kaj klopodoj konsistigas fortan kolonon de la kataluna esperantismo.

El la «Bulgara Esperantisto» de Majo n.º 9, ni ĉerpas la jenan sciigon. Laŭ ĵus ricevitaj informoj, ni sciigas, ke la ĉi-jara aŭstra esperanto-Kongreso okazos en Salzburg dum la unuaj tagoj de Aŭgusto, tuj post la universala Kongreso. Antaŭ kaj post la Kongreso estos aranĝitaj ekskursoj. Por pli detalaj informoj turnu vin al Esperanto-Kongreso, Elisabeth-str. 17 Salzburg.

Jen alia sciigo same ĉerpita el la nomita gazeto, kaj ankaŭ tre interesa al la esperantistoj. «La informa Servo de la Ekstera Ministerio de Finnlando petas nin informi al la tutmonda esperantistaro, ke la Ministerio sendis al la legacioj kaj Konsuletoj de Finnlando ekzemplerojn de la lukse presita ilustrita verko «Vojaĝado en Finnlando» por senpaga disdono al la personoj kiuj interesigas pri Finnlando. Kun plezuro ni transendas ĉi-tiun informon en la espero ke la esperantistoj baldaŭ elĉerpu la provizon nun aĉetitan de la Ministerio».

Honore at K. E. F. — En la Salonego por Festoj sur la monto Tibidabo la 5^{an} de julio okazis Festo de simpatio al K. E. F. Ĝi konsistis el dancoj de la «Esbart Folk-lore de Catalunya», kantoj de nia fervora esperantista muzikistino F-ino. Palmira Castellví, kaj poezioj de nia samideano Artur Domènech, kaj de S-ro. J. M.^a Deulofeu. Kompreneble ĝi sukcesis, kaj ni estas dankegaj al la nomitaj partoprenintoj kaj al nia kara kaj fervora samideano D-ro. Bartomeu, kiu estis silenta iniciatinto kaj antaŭenpuŝinto de tiu bela Festo.

En Pola Esperantisto, sur paĝo 53 de aprila numero, S-ro. Jan Kostecki dediĉas laŭdindan artikolon al la rememoro de la perdita por ni honorinda Antoni Grabowski, unu al la plej kuraĝaj kaj entuziasmaj pioniroj de la monda esperantistaro, poeto eminenta kaj prezidinto de Pola Esperantisto. Ĉi-tiu gazeto invitas pere de S-ro. Kostecki ĉiujn amikojn enlandajn kaj eksterslandajn, fratojn en la idealo, kiuj konis lin, kaj ne forgesis lin, ne ŝparu

momenton de laboro. Ĝi malfermas vaste siajn kolonojn al ĉiu rememoro pri Antoni Grabowski, akceptante eĉ plej malgrandan memorajon.

Gvidlibroj de Mallorca. — Nia kara amiko organizinto de la XII^a Kongreso, krom la ekzempleroj de la «Gvidlibro de Mallorca» senpage disdonitaj al ĉiuj kongresanoj ĉeestintaj, sendis al ni 150 ekzemplerojn ankaŭ por senpaga disdono al la K. E. F-anoj kaj kongresanoj kiuj ne povis veturi al Palma. Al tiuj kiuj ĝin petos de ni ni sendos ekzempleron de tiu bela, luksa esperantaĵo memoriga pri nia sukceso en tiu ĉarma insulo.

Forveturo de Gili al Ameriko. — Nia kara amiko kaj konata samideano Joan Gili, pro profesiaj aferoj denove forveturis al Centramerikaj landoj. Ni kiel amikoj kaj samideanoj tre bedaŭras lian foreston kaj esperas ke li baldaŭ revenu kaj definitive loĝadu kun ni en Katalunujo. Lia kunesto al ni tre efikas por sukcesigo de esperantistaj entreprenoj.

Katalunaj teknikistoj en Londona internacia Kongreso pri Radiologio. — Droj. Jacint Bremon kaj Ramon Torres i Carreres kaj S-ro. Josep Grau, kiuj estas amikoj kaj fervoraj samideanoj niaj la tri, ĉeestis tiun Kongreson okazinta en la angla ĉefurbo en junio-julio. Ili certe profitis ĉian favoran cirkonstancon propagandi, enkonkuki, tie influi por Esperanto.

Internacia agado de K. E. F. — La Internaciaj Floraj Ludoj, la tutesperanta teksto de nia gazeto, la ĉeesto de reprezentantoj niaj, Gili en la Pahiizaj Konferencoj, Domènech en la Kordova Kongreso, Bremon, Torres kaj Grau en la Londona Radiologia internacia Kongreso k. t. p. ja montras la viglon kaj la forton de la Kataluna esperantismo. Ĉiuj niaj amikoj rekonu ke ĉies helpo estas al ni necesa por subteno de nia organizaĵo kiu permesas la plezuron al ni plenumi nian devon efiki plej multe por nia sankta afero.

K. E. F. reprezentota en la XVII Universala Kongreso. — La Prezidanto de nia Federacio veturos al Ĝenevo por reprezenti ĝin en la Universala kunveno de la Esperantistaro.

En Palma de Mallorca la 12^{an} de Julio solene okazis rememorigo pri datreveno de la fondo de la nun viglega Esperantista Klubo Palma, kaj inter la festoj por tio estis kunveno honora kaj danka al nia pioniro tiea Narciso Bofill por festi la grandan sukceson de nia Kongreso tie okazinta dank' al lia kuraĝo kaj fervoro. — En nia proksima numero ni raportos pri tiuj okazintaĵoj, sed tuj ni deziras gratuli niajn Palmajn samideanojn kiuj revigligis post nia Kongreso kaj scias honori sin per homaĝo al pioniro kiu meritas netakseblan dankemon de ĉiuj samideanoj en nia komuna organizaĵo en K. E. F.

Atentu!

Ree ni devas nin turni al niaj federaciauoj kaj abonantoj kiuj ankoraŭ ŝuldas sian kotizaĵon kaj abonpagon, kun la peto ke ili bonvolu senprokraste efektiviĝi kvitiĝon.

Tio almenaŭ kion ni rajtas esperi el la esperantemo kaj samideaneco de niaj amikoj estas la akurata pago de iliaj abonoj por helpi la efikan funkcion de nia kara Federacio kaj organo.

Niaj abonantoj povas sendi al ni la ŝuldatan monon per poŝta-ĝiro aŭ svisa, brita aŭ usona mono, adresante la korespondaĵon al Prezidanto de K. E. F. Carrer València, 245, Barcelona.

Rememoru:

Simple jarabono kostas 6 ptojn. por Iberiaj kaj Amerikaj landoj
 » » » 6 sv. fr. por aliaj landoj
 Membrecio al K. E. F. 3'50 ptoj

Pareu esment!

Ens veiem obligats una altra volta a suplicar als nostres federats i abonats que encara deuen quotes, que ens trametin sense ja ajornar-lo més, el pagament.

El que nosaltres almenys tenim el dret d'esperar dels nostres amics i correligionaris és l'acurat pagament de les quotes per fer possible el desenvolupament eficaç de la nostra Federació i revista.

Poden enviar el diner per gir-postal o simplement per segells de correu. Adreceu la correspondència al President de K. E. F., carrer València, 245, Barcelona.

Recorden:

Abonament revista. . . . 6 pts.
 Membre de K. E. F. . . . 3'50 »

Internacia Studenta Esperantista Asocio

Ni komunikas, ke dank' al interkompreniĝo kun Internacia Unio de Studentoj ni akiris por niaj membroj eblecon ricevi en Genevo pensionĉambrojn por prezo 180-300 sv. fk. monate (sen servopago), kiujn oni devas jam nun mendii ĉe Internacia Unio por Studentoj (Union Internationale des Etudiants) 10, rue Saint-Leger, Genevo. Samtempe ni petas ĉiujn niajn membrojn, kiuj ĝis nun ne pagis la kotizon (2 sv. fk. por membroj aktivaj kaj aspirantaj, 5 sv. fk. por membroj subtenantaj), senprokraste sendi al ni la kotizpagon. Al membroj nepagintaj ne estos sendataj membrokartoj. Informoj pri kunsidoj de ISEA dum la XVII-a aperos poste. Adreso de sekretarioj: *Lidja Zamenhof*, Krolewska 41, Varsovio, Polujo.

Antaukongreso en Bern.

1-a de aŭgusto 1925

Lasta sciigo

Nia dubo pri neokazo de la berna antaukongreso pro nesufiĉaj enspezoj feliĉe sin montris malprava. Do, ĝi okazos definitive la 1-a aŭgusto 1925. Ni atentigas la kongresantojn ĝis nun ne sendintajn aliĝilon, ke ili ne rajtas partopreni la feston sen kongreskarto. Kongreskartojn ni vendos en la stacidomo mem. La inaŭguro de nia belega bronza memoraĵo okazos la 1-a aŭgusto, 15 h. posttagmeze. Vespere komuna vespermanĝo, vizito al la iluminata urbo kaj koncerto. Do, venu kiel eble plej multnombre, la berna esperantistaro tute akceptos vin.

La organizantoj:

Jules Perlet; Jakob Schmid.

Adreso: Poŝtkesto transito 560, Bern (Svisujo).

Laborista Esperantista Klubo London

Kunvenoj okazas ĉiun sabaton vespere. Esperanto-kurso komenciĝas je 6,30-7,45 h., paroladoj, diskutoj ktp. je 8,00 h. Ĉiuj estas kore invitataj. Klubejo estas 144 High Holborn, WC. 1. (Entrejo ĉe Silver Strato) Trinkajoj kaj manĝaĵoj estas tre malmultekostaj.

Programo: Julio-Septembro 1925

Julio 4: Traduka Vespere (k-do Wood); julio 11: Propaganda Vespere en Hyde Park; julio 18: Spertoj el la Vivo (k-do Reeks); julio 25: La Ko-operativa Movado (k-do Parker); Aŭgusto 1: Interparoladetoj (la membroj); aŭgusto 8: Eroj el „The Age of Reason” (k-do Chatters); aŭgusto 15: La Esperantaj Ĵurnaloj (k-do Flower); aŭgusto 22: Socialismo kaj Religio (k-do Glaser); aŭgusto 29: Rasal Problemoj (k-do Sturmer); Septembro 5: Diferenco inter SAT kaj BLES (k-do Spiller); septembro 12: La Evolucio (k-do Geary); septembro 19: Ko-operativaj Kolonioj (k-do Crocke); septembro 26: Kuracado per Aŭto-sugesto (k-dino Hyams).

Honora sekretario.

W. C. Chatters, 8, Elgin Terrace,
Maida Vale, London W. 9.

LITERATUK

DO

La plej valora literatura esperanta revuo.

Rekomendita de la XVIa Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉiu esperantisto devas ĝin aboni.

La plej bonaj stilistoj estas ĝiaj kunlaborantoj.

Turnu vin por abono:

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Duonsemajna
Aktuala Ilustrita
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo

Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA

1 0 0 0 0

membrojn
devas
havi

U E A

en 1925.

Aliĝu tuj por atingi

1 0 0 0 0

Aliĝojn akceptas la lokaj Delegitoj, aŭ la Delegito en Barcelona: S-ro Delfi Dalmau, València, 245

H A V E B L A

1/4 - paĝa anonco en nia gazeto
kostas nur 10 ptojn.; sed valoras
multe.